# THREE PIONEERS OF LANGUAGE

**By Professor W. E. Collinson, M.A., Ph.D.**
**(Professor of German and Philology, University).**

Language is essentially a social phenomenon. Any attempt by an individual to make a change or bring in a new word comes to nothing if society is not willing to accept it. Now and then an individual has succeeded in introducing into his mother tongue a word which he himself has compounded, or even invented.

In the "Transactions of the Philological Society" (1938) A. S. C. Ross quotes from the Esthonian language several words which were created by Dr. Aavik, e.g., "relv," meaning weapon, and "nemp"—bagatelle. In one instance the mistake of a linguist became firmly implanted in the common language: The Hungarian, Sajnovices, looking for a Ugro-finnic substitute for the Latin word "forma," found in a Lapp dictionary the word "minta", with the meaning given as "form, figure". This Lapp word reminded him of the Magyar expression "mint a" meaning "as that one," so he adopted it and it is now in general use. Actually, "minta" in Lapp means "Coin", and the word for "form" should be "minstar", but through a printer's error they had been mixed up. The English word "syllabus" may, according to the Oxford English Dictionary, be perpetuating the mistake of a humanist who misread the Greek word "sittabos"—label.

In the examples quoted an individual did therefore succeed in leaving his mark, but only in odd words. Much rarer are the instances of an individual making a profound impression on the evolution of his native tongue, or even creating an entirely new language which his fellow-countrymen would accept. Here we might look at the work of three important reformers in the field of language: The Finn, Lonnrot, who made the Finnish language capable of serving as a cultural language; the Norwegian, Aasen, who freed Norwegian from dependence on the Danish; and Zamenhof, who built up from elements common to many European languages a neutral language as a second means of communication between all peoples.

When Elias Lonnrot was born in 1802 in a village near Helsinki, the Swedish language held an unchallenged position as the cultural language of Finland. However, the annexation of Finland by Russia in 1809 and the granting of a constitution made conditions more favourable for a revival of Finnish. Elias was the son of a poor tailor and had a struggle to gain education, but he succeeded in entering the university at Turku where he studied philosophy, and later, medicine. Becoming a doctor in the country village of Kajaana, his interest was caught by the scraps of folksongs and folklore that still persisted there. He made long journeys on foot through the primitive regions of the Eastern and Russian Karelias and was able to collect an abundance of material for the reconstruction of the folksongs of the great national epic of the Finns, telling of their heroes such as Vainandinen and Ilmarinen the Smith, and of the Quest for the Magic Mill.

The first edition of the "Kalevala" appeared in 1835, the second published in 1849 had been enlarged to more than 22,000 lines. It not only became popular in Finland but was soon known all over Europe through the French translation by Leouzon le Duc (1845), the German by Schiefner (1852), and the Swedish by Collan (1864). Above all it enriched and brought prestige to the Finnish language by the vast new terminology in mathematics, science, jurisprudence, etc., which Lonnrot established firmly in a large Finnish-Swedish dictionary of more than 200,000 words.

The background of Ivar Aasen was somewhat similar to that of Lonnrot. From the fourteenth century up till 1814 Norway had been subject to the King of Denmark. There were always many Danish officers and clergy; the Bible was in Danish, and the young Norwegians went as students to Copenhagen which was the main cultural centre. The words of the Norwegian form of Danish were spelt according to the rules of

Danish orthography, although the Norwegians used a different pronunciation.

The Norwegian poets had sought to give the language a more truly native character, but actually it remained Danish-Norwegian. Only the peasantry and fishermen, particularly in the western and southern provinces, still used dialects closely resembling that which the Icelanders were using at the time of the emigration in the ninth century. Ivar Aasen, the son of a country labourer, was born in 1813 in Volde, in the western region of Sunnmore. With great perseverance he educated himself and became a teacher in a country school, often visiting his pupils in their homes, and later was a tutor in a private family. He was an earnest student of botany and collected the common names of all the plants. This led him to study more carefully the regional dialects, and with the support of patriotic Norwegians he travelled about the country making a list of dialect words and expressions. With great tact and a feeling for the values of somewhat archaic but forceful and intimate speech usages, he himself selected and compiled from the various dialects a new "super-dialect" which he called the "landsmaal"—the "language of the country", now known as "nynorsk" or New Norwegian. He even wrote poems and a cantata in it—"Symra" (anenome).

In spite of the opposition of Ibsen and Bjornson, who favoured the Danish-Norwegian forms used in the eastern provinces, the language of Aasen was adopted by several important authors such as Arne Garborg and Olav Dunn, and was finally made an official language for instruction in schools concurrently with "bokmaal", the book language more closely related to the Danish.

The background of Zamenhof was the Polish town of Byalostok, under the rule of the Russian Czars. There he was born to Jewish parents in 1859. Even as a child he felt deeply the lack of sympathy between the various races and religions—Catholic, Greek-orthodox, Jewish. In his boyhood he learned not only Polish, Russian, and German, but also the classical languages, and later on French, Italian, English, and of course Hebrew. He had a great affection for the Russian language but admired the simplicity of the English grammar.

During his college years he planned to bring about harmony by the creation of an auxiliary language which could be easily learned and used by people of all races, and his fellow-students celebrated his first project when he was 19 years of age. It was apparently a chance observation which gave him the key to maximum simplicity. In the street of a Polish town he noticed that the signs over several shops had the same termination—"-skaja". It occurred to him that, given a series of suffixes with definite functions—doer, place, collection, etc., one could build up from a small number of bases or "roots" thousands of new words. Bit by bit he improved his language and finally in 1887 published a small book with the title "The International Language of Doctor Esperanto," using "Esperanto" as a pseudonym because of the Russian censorship. Soon the full title was abreviated in speaking to "The Language Esperanto."

Since that time Esperanto has spread in many countries, has been used in many congresses, and while remaining fundamentally the language of Zamenhof, has been adapted for modern requirements in science, technology, medicine, radio, aviation, etc. It is worthy of note that Zamenhof, who by the way was an oculist, himself regarded Esperanto as a means to a higher end, namely the fraternizing of all races and religions on a common ground. He enunciated the principles of Hillelism, or "Homaranismo," a creed which requires that a man's first loyalty shall be to the interests of humanity as a whole. In this Zamenhof was a prophet and his programme merits re-publication in the present period, when men are thinking in terms of United Nations and "Federal Union."

---

## LIBERA FORUMO.

(vakas.)

Subscriptions:—J. Dudley, 12/6.

## ESPERANTO AROUND THE WORLD.

SWITZERLAND: With Dr. Edmond Privat, Hans Jacob and others the new general consul, Ralph Harry, of Australia, spoke in fluent Esperanto at the 50-years jubilee celebration of the Swiss Esperanto Society.

GERMANY: Esperanto in addition to German, French and English is now used in the time-tables of the German Federal Railways.

AUSTRIA: A postage stamp in Esperanto will be issued to commemorate the jubilee of the Esperanto movement in Austria.

ITALY: At Como 500, including 100 from other lands, attended the national Esperanto congress. Under the presidency of the State chief, President Einaudi, Privat and eminent Italians spoke.

JAPAN: In Tokio, Prof. Kirpal, vice-pres. Cultural Activities of Unesco and a friend of Eperanto, learned from Mr. Mijake, director of Japan's Esp. Inst., that in almost every University in Japan there are Esperanto circles and that the Japanese Govt. had sent to the Unesco centre information on the movement based on the unmodified report of the Japanese Esp. Institute. (Lapenna in "Esp-o," June, 1952, assesses that 30,000 people in Japan know Esperanto.)

The rector of Tokio Uni. advised the 400,000 members of the Society of Postal Friends to learn Esperanto. He said, "Corresponding in Esperanto, you will be under no language handicap and will not have to humiliate yourselves before Westerners". Several are now learning Esperanto under Mr. Mijake.

## AŬSTRALIA KRONIKO.

**BRISBANE:** En 25 Aŭgusto okazis la jarkunveno de la Brisbana E-Soc. Elektiĝis la jenaj kiel nova estraro:—Prez.: S-ro S. L. Parry; vicprez-oj: S-roj E. G. Littleton kaj A. d'Oliveyra; sek-ino/bibliotekistino: F-ino E. B. Carrick; adjunkt-sek-ino: F-ino I. Reed; kasistino: S-ino V. Fraser.

En 31 Aŭgusto okazis intervjuo ĉe radistacio 4BC en Radio Newsreel. La stacio intevjuis S-ron Parry pri la E-movado ĝenerale. S-ro Littleton kunlaboris kun S-ro Parry je la materialo, kaj la brodkasto kaŭzis vastan intereson, kio evidentiĝis per informpetoj ricevitaj.—S. L. Parry

**CANBERRA:** En Oktobro S-ro Jim Sullivan estis elektita vicprez. en loko de S-ro Harry. Ĉar "Esperanto" ĵus venis, la prez. paroladis pri la universalaj kongresoj—kiaj ili estas, kiel ili organiziĝas k.t.p. kaj ankaŭ pri la okazajoj ĉe la Zagreba kongreso.

Ni ĵus ricevis de la E-Instituto de Japanujo, per la japana ambasadoro, kolekton da libroj, folioj k.a. celitaj por nia junia ekspozicio. Ili alvenis malfrue, pro malfruiĝo de ŝipo, sed ni montris ilin ĉe la kunveno, kaj donacis kelkajn al la Nacia Biblioteko.—Harry Torr.

**PERTH:** Nia nova rondo ĉe Woorolee progresas, kaj kvar anoj vizitis la malsanulojn dimanĉe 4 kaj 18 Oktobro. D-ro A. Einihovici, nia vicprez., tre ĝojas pri la afero.

Pro la Royal Show en Perth je nia kutima dua ĵaŭdo, la monata kunveno okazis je la tria ĵaŭdo. S-ino A. Sedgley donis al mi informan paroladon pri loka grupo por plibonigi internacian amikecon. F-ino Strempel raportas de Albany pri studanta rondo de 9 personoj. S-ino Dougan helpas ŝin pri instruado.

**SYDNEY:** En Sept-o ni ĝuis viziton de F-ino Carpenter el Novzelando, survoja al Bahai-kongreso en Hindujo, kaj Izraelo. Ni interesiĝas aŭdi pri tiuj landoj, el kiuj nur malofte venas raporto. Ni nun atendas ĝis la jarfino, kiam ŝi denove trapasos la klubon, hejmenire.

Ge-sroj Banham, feriante en Sept-o, vizitis nian grupon. S-ro Banham donis prelegon pri Zamenhof kaj fruaj diskutoj pri E-esprimoj. Ni ŝatis tiun kontribuon al nia scio pri la historio kaj kulturo de nia movado.

La Novgineaj kanibaloj indulge relasis al ni F-inon Marie Day, kiu ĵus revenis al la klubo post 4-monata deĵoro en Port Moresby. Ŝi estis tie, kiam oni celebris la kronadon de Elizabeto, kaj tial havis bonan okazon vidi indiĝenajn ĉefojn en plena dekorajo, kaj procesiojn. Ŝiaj fotoj de indiĝenoj, urboj kaj ĉirkaŭaĵoj de Port Moresby estas vidindaj.

En Okt-o S-ro Guilbert el Tasmanio vizitis la klubon. Ĉiuj, kiuj aŭdis lin priskribi la allogaĵojn de Suda Tasmanio, esperas iam viziti tiun belan landeton. Dum vesper-

manĝo kaj socia vespero aranĝita de S-ino Klussendorf, ni havis pluan okazon babili kun nia vizitanto kaj malstreĉiĝi en hejma atmosfero.

Nia ano Josefo Ivičevič diris al ni ĝis revido ĉi-monate, ĉar pro malbona sanstato li iras al Novzelando. Ni ĉiuj esperas, ke li baldaŭ resaniĝos kaj revenos "kun rapido."—E.D.

**MELBOURNE:** Agrabla surprizo por MK-anoj (7/10) estis vizito de malnovaj konatoj Ge-sroj Schwerin el Sydney. Responde al la bonvenigaj vortoj de la prez., S-ro Schwerin salutparolis al ĉeestantoj.

Treege interesa vizito estis tiu de S-ro Manjong Kim el Koreujo. Ĉi tiu ĉarma orientano venis al Aŭstralio ne nur kiel E-isto sed ĉefe kiel ĥemia inĝeniero por esplori produktadon de gaso el torfo. Do malgraŭ sufiĉe longa restado diversloka en nia lando, li povis dediĉi al E-istoj nur malmulte da tempo. Domaĝe, ĉar ŝajne li povus multe instrui nin pri sia lando. Alvenintoj ĉe la klubejo (14/10) salutis altan, rideman s-anon, kiu volonte sed modeste akceptis inviton alparoli nin, kaj, kun helpo de skizoj sur tabulo, kompetente prelegis pri la deveno kaj evoluo de sia nacio kaj lingvo.

Refreŝigan intimon de ĉirkaŭtabla rondo estigis nia ĉarma S-ino Leereveld, Nederlandano (21/10). Informo pri ŝia lando kaj ĝia fama pentristo Rembrandt estis la temo pri kiu ŝi interese parolis kaj samtempe montris bildojn.

Manko de spertaj parolantoj devigas, ke ni tro laborigu areton da volontuloj. Por komplezi, S-ro Koppel pluajn du fojojn (4/11 kaj 18/11) priskribis dummilitan vivon en Kanado—ŝajne neelĉerpeblan fonton da intereso; sed F-ino E. Godfrey preferas laborigi aliajn, kaj venĝis sin (25/11) per prezento de plua demandaro—pensinstiga kaj bona ekzerco por tiuj, kiuj ne multe parolas. Alia volontulo, kiu malgraŭ nuntempa nokta laboro ĉeestis por kontribui al niaj programoj (2/12) estas vicprez. D-ro Fridenbergs. Filozofa traktato pri la sendaŭreco de feliĉeco estis pensinstiga temo, sed tuj forrabis al ni la feliĉon lin aŭskulti. "Ĉar," li diris, "kvankam oni spertas feliĉon eĉ ĝis ekstazo, tuj kiam oni pripensas ĝin, oni jam ne estas feliĉa."

RENDEVUO: Ĉeestantoj ĉe la Okt-a kunveno ĝuis la sperton aŭskulti la ne ofte vidatan AEA-prez. K. Linton. Li parolis pri laboro ĉe fabrikejo, kies vendfakon li estras. Ĝiaj produktaĵoj estas kliŝoj kaj metalaj afiŝetoj por alfiksi al varoj de aliaj firmoj. La verkista stilo kaj firma voĉtono de S-ro Linton ĉiam streĉe tenas la atenton.

Ĉe la Novembra kunveno, S-ro E. Hanks faris duan prezentadon de bildoj faritaj en 1908 de lerta fotografisto kaj naturamanto S-ro Matingly. Ĉifoje la bildoj temis pri rondvojaĝo per ŝipo en Bass Strait (markolo inter Tasmanio kaj Aŭstralio) kaj vizito al diversaj insuloj por observi birdojn kaj birdvivadon. Kiel kutime, la klarigaj vortoj de la parolanto estis informriĉaj.

Aldono al Sydney: S-ro M. Kim kontaktis la Klub-prez., S-ron Matasin, kaj kiel ties gasto ĝuis aŭtomobilekskurson al la Bluaj Montoj.

**ADELAIDE:** Nenia raporto.

---

## WINGEN-ERARO.

Rondo 59, p. 40: S-ro Frank Halls skribis, "Wilhelm kaj Hans Wingen ne estas fratoj sed patro kaj filo. Mi tre bone konas kaj alte estimas ilin. La tuta familio, gepatroj kaj Hans (la sola filo) estas tre spertaj kaj entuziasmaj E-istoj.

"S-ro Wingen akompanis min al la 37a Kongreso en Oslo kaj la familio multfoje gastigis min dum mia dumonata restado en Koeln. Wilhelm estas instruisto kaj Hans ankoraŭ studento ĉe la Koeln's univ. . . . tre mirinde, ke, inter sia intensa studado, li tamen trovas tempon por eldoni lernolibrojn, vortaron, verki multajn artikolojn kaj aliajn aferojn kiel 'Aktuala Terminaro' kaj 'Esperanto-Post'. La familio ne estas 'fanatikaj E-istoj' (ja estas multaj tiaj en Eŭropo) sed seriozaj uzantoj de la lingvo. Mi volas diri, ke ili uzas la lingvon serioze—ne ke ili estas emocie seriozuloj; kiel la plimulto de Rejnlandanoj ili estas spritaj, bonhumoraj homoj." La red. petas pardonon al s-roj W.

# Recenzoj

**HISTORIO DE S.A.T.** 1921-1952. 152 p. Prezo 13/6 de A.E.A. Libra Servo. Eld. S.A.T.

Kerneca kroniko de tiu altsignifa kulturorganizo supernacia, kiu per E-o celas la idealon: sennaciecon. Cite el ĝia statuto: ". . per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj." Jen ludo por la logikistoj kaj analizantoj de vortsencoj. Kio estas "fakto", vorto tre misuzata? Kio estas "dogmo"? La vorto ne esence enhavas nocion de arogeco. Ĉu dezirinda estus perfekta emancipo aŭ forviŝo de el la instruoj, kiujn oni ricevas "en sia aparta medio"? Ĉu forjetinda estas ĉio en la pensa tradicio de nia respektiva civilizacio?

Tamen, kio estus dubesenca por iuj ne forbaris aliĝon de miloj da mense aktivaj homoj al la jam duarange potenca, an-hava organizo en la E-movado. S.A.T. prezentas per si mem grandegan bastionon de la interlingva ideo, kaj per sia herezema, liberpensa atmosfero daŭre tiras en sin freŝe originalajn animojn, kiuj antaŭ ĉio uzas la lingvon kiel atestilon kontraŭ la naciismo.

La Historio pritraktas aŭ aludas la internan fermentadon en kiu ideologiis anarkistoj, trockistoj, bolŝevistoj, teistoj; ĝi rakontas la lukton kontraŭ eksteraj fortoj, Kremlismo kaj Naziismo. La unua siatempe penis akapari la organizon; la dua tuj elpelis ĝin.

Kiel nun starus E-o en Sovetio, se tiame la bolŝevistoj sukcesus venki la oponon aŭ logi la kunlaboron de Lanti kaj aliaj nekonformuloj? Eble la sorto de la neŭtrala E-movado sub Hitler donas respondon. Post penoj konformiĝi kun la reĝimo, la movado ricevis—neniigon.

Mankas voĉoj por diskutataj partioj, pro evidentaj cirkonstancoj. Devas esti, ke S.A.T. sentis tenton fari kompilon nur defendatestan, sed ni kredas ĝin sufiĉe objektiva kaj konforma kun ĝia virta principaro. Koncernatoj rajtas peni refuti la jam starigitan prezenton; sed ĝis ili sukcesos tion fari, ni rigardos la verkon laŭfakta.—F.R.B.

**LA SEPA KANDELINGO.** Kotohiko Macubara, Tenmori, kozoĵi Higaŝikasugai, Aiĉiken, Japanujo. 2 resp. kup. 15-paĝa. Aludo al Apokalipso 1. Kvazaŭ sintezo de la vorta instruo de Kristo kun la Budaismo, kun la kromaĵo, ke en la templo ĉe Tenmori nun riceviĝas diaj revelacioj por veki la dormantan konscion de la homaro, la fonton de la monda malfeliĉo. La valoron de la donitaj logosoj (vortoj) la legantoj mem taksi.—FR.B.

**POEMOJ DE OMAR KAJAM,** el la Persa trad. G. Waringhien. 60p. 6/6 de A.E.A. Libra Servo. Eldonis S.A.T.

La alilingvaj tradukoj de la "Robaioj" (inter ili la E-a de C. M. Bean) estas plejparte nur adaptoj de la fama verko de Fitzgerald. Tradukinte rekte el la Persa originalo, nia erudita amiko majstre uzis la mirindan medion de nia lingvo por elĉizi 150 strofgemojn de la plej pura speco. Admirinda fortostreĉo! La antaŭparolo estas valora kontribuo al la literaturo pri tiu nemortema plendo pri la mortemeco de la Homo. "Li venis unu tagon, foriĝis por ĉiam." "Oni ne plu revenas; sepult' estas sepulto." Tamen duboj persiste enrampas: "Ja ne certas ĉu vi alvenos al (postmorta) Edeno; vivplio estas duba; (Omar) ne sciis, ĉu lia Farinto destinis lin al Edeno aŭ Infero—aŭ al la eterna Nenio. Ne estas homo scianta pri la Pretero." Jen negativa sinteno, malmulte inspira en profunda senco, tamen la plej kortuŝe bela prezento de la hedonisma filozofio ekster La Predikanto, kantita de la Hebreoj antikvaj. Por helpi al pensa ekvilibro, oni saĝe legus samtempe eseon de la optimisto G. K. Chesterton en "Heretics" (herezuloj)—Omar kaj la Sankta Vinberujo.—F.R.B.

---

AŬSTRIA ANTOLOGIO, kompilita de la Aŭstria Esperanto-Instituto, kajeroj 1-4. 64 paĝoj, broŝ. Prezo 4 internaciaj r.p., ĉe la eldonejo "TRAMONDO", GMBH, Wien 15, Fuenfhausg. 16.

Tre grava loko en la Esperanta literaturo estas tio okupita de la respektivaj antologioj de la naciaj literaturoj. Bedaŭrinde, mankas ankoraŭ kelkaj el la ĉefaj, sed la nuna broŝuro estas kuraĝa provo plenumi unu tian

mankon. La antaŭparolo informas ke la membroj de la Aŭstria Esperanto-Instituto daŭre laboras, tradukante "perlojn de la aŭstria literaturo," sed ĝis nun la ekonomiaj cirkonstancoj malpermesas ke ili aperigu la jam kolektitajn tradukaĵojn presitaj. Do, la eldonantoj decidis publikigi ilin en vicoj de kajeroj laŭ "manuskripta eldono" (multobligita maŝinskribaĵo) kun eksteraj folioj presitaj. La teknika laboro estas kompetente farita kaj rezulte la tuto estas neta kaj facile legebla.

Paralele kun la Esperanta teksto aperas ankaŭ la germana originalo—kelkfoje eĉ la mezaltgermana de la dekdua jarcento, kies lingvo diferencas de la moderna germana samgrade kiel la lingvo de Chaucer diferencas de la nuna en Anglujo. Dr. E. J. Goerlich en interesa historia enkonduko emfazas ke la aŭstria literaturo ne estas identa kun la germana, malgraŭ ke la plejmulto estis verkita germanlingve. La parto de la aŭstria kiun ni ĉi tie ricevas certe vekos en la legantoj deziron por la tuta serio.

—I.P.H.

---

**La Homaro kaj la Mondbildo** de Martinus. El la dana trad. C. Graversen. 124 p., bind. Prezo 6,50 dkr. -|-sendkosto. Eld. Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo.

La doktrino de Martinus instruas ke la konscio de la homo pri "la bazaj principoj de la mondotuto (t.e. de "la universo kiel materia kaj spirita fenomeno") evoluas grade. Tiu evoluado rezultas el la sinsekvaj spertoj kiujn li travivas, ekde la bestecaj spertoj de la prahomo, ĝis la plej alta sperto—la "persona kontakto kun Dio."

Laŭ Martinus, ĉi tiu sperto estas akirebla "nur pere de persona evoluado laŭ nia propra kosmo spiralvojo", kaj venas nur "post la lerna kaj iniciĝa migrado tra la mallumo de multaj reenkarniĝoj". Kiam ĉiuj homoj estos atingintaj la plej altan stadion, ni havos amon al la proksimulo kaj pacon sur la tero.

El la 69 ĉapitroj, 13 estas titolitaj, "La eterna analizo (A ĝis M, respektive) de la mondbildo". Ĉi tiu aranĝo ŝajne celas doni impreson de severe scienca metodo. La lingvo-uzo, kontrolita de la Literatura Komitato de S.A.T., estas senerara, sed la multfoja ripetado de frazoj kaj terminoj impresas iom tede. Preso, papero, kaj la ĝenerala aspekto de la libro estas plaĉaj.—I.P.H.

---

**DUOBLA NUMERO!**
**La ekstraj ok paĝoj estas tiuj, kiuj ne eldoniĝis en Decembro.**

---

## FOR A "GOLDEN BOOK".

We have had "Black Books" about the cruelties of war; how about a Golden Book telling of the kind things that mitigate the strife of men? Here's one. Send us some more about what Esperantists do in the work of human relations, especially under war conditions.

A Cologne lady E-ist to the Italian "L'Esperanto":—"The truth of the saying, 'Esperanto is a bridge between the people' I've personally learned by experience. My nephew fell in action near Udine (Italy). Where he was buried we couldn't find out. That was in 1945. In the summer of 1952 the world Congress of Esperanto drew over 1500 E-ists from 34 countries. In the Congress visiting list I found that Mr. and Mrs. Zoratti of Udine were there. Having sought them out, I told them of my nephew's fate. Helping hands gripped mine as they promised me that they would look for the grave and care for it as though their own son lay therein. Soon after my return home I received a detailed letter and several photos of my nephew's last resting-place.

Mr. Zoratti had set out immediately to find out where the German A.A. battery had been situated. On learning this, he went to a nearby cemetery and read the list of German soldiers buried there. My nephew's name was among them, and the grave was then located."

---

## IS YOUR CLUB A SECRET SOCIETY?

State reporters, don't fall down on your job. Send in to us regular reports of your club activities, clearly written and double spaced if typed. Verify spelling of all names and initials. If your club has no report in each issue of the gazette, you are turning your organisation into a secret society!

## SPEAKING ESPERANTO.

For a person unversed in foreign languages, but using his common sense, Esperanto is a means of expression which, speedily and without undue effort, he can so assimilate that, as experience has often shown, he later speaks this language better, freer and with less hesitation than he does his mother tongue, cumbered, as this is, with peculiarities; while; by reason of his consciousness that what he says is **correctly** said, his self-confidence and will to express himself are remarkably stimulated—indeed, life has shown that it was not until they occupied themselves with Esperanto that many people learned to use their own tongue correctly.

---

Por homo neinstruita pri fremdlingvoj, tamen uzanta la simplan prudenton, Esperanto estas esprimilo, kiun, rapide kaj sen troa streĉo, li povas proprigi al si en tia maniero, ke, kiel la sperto jam instruis, li poste parolas ĝin pli bone, flue, malpli hezite ol la patran lingvon densan je parolapartaĵoj.

Krome, pro lia konscio, ke, parolante, li **korekte** parolas, liaj memfido kaj esprimvolo estas rimarkinde stimulataj—verdire, jam montris la praktiko, ke multaj homoj tiam komencis uzi la patran lingvon korekte nur kiam ili okupis sin pri Esperanto.

---

Tradukita el la Germana de Wm. Oeste. La red. rimarkus, ke tio ŝajnas vera pri almenaŭ du el liaj konatoj.—Lanti kaj P. Hudson.

---


## GIVE BOOKS FOR CHRISTMAS. ORDER BOOKS FROM:

Mrs. O. Glenie, 90 William St., S.2.

Mr. A. Towsey, 41 Hill St., Parkes, N.S.W.

Miss E. B. Carrick, 167 Lytton Rd., East Brisbane.

Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Add 10% for postage.


## THE PYKE MEMORIAL.

---

This examination will be held next November. Certificates will be awarded to all students who gain a minimum of 66 2/3% points, and a special prize of £5/5/- to the student who similarly succeeds after not more than one year's study, starting from Nov. 1, 1953. Form your classes now! Entries should be in my hands by Oct. 25.

Leaders are asked to refrain from pressing students to participate in the examination unless these have a reasonable chance of success, as failure in an examination could have a discouraging effect on slower learners.

Results for 1953: Special Prize: Miss Mary Allgood (Sydney), 86 points; runner-up, Miss Hope Crampton (Adelaide), 80, honors; Miss A. Longson (Perth), 75; Miss C. Jackson (Sydney), 70. Twelve entered.

F. R. BANHAM,
Chief Examiner.

---

## LA PLEJ SUDA E-KONGRESO EN LA MONDO.

En "Argentina E-isto" (5/6, 1953) la redaktoro, s-ano Jorge Hess, fiere anoncas ke la 7-a Argentina E-Kongreso, kiu okazis paske en Bahia Blanca, estis "la plej suda E-kongreso en la mondo." Ni, do, ekzamenu la faktojn. Bahia Blanco kun suda latitudo de 38 Gradoj kaj 49 Minutoj kuŝas iom pli sude ol Melburno, kiu havas sudan latitudon de 37 Gradoj kaj 45 Minutoj. Sed la 15-a Novzelanda E-Kongreso, en la jaro 1950-a, okazis pli sude, nome en Wellington (41 Gr., 15 Min.). Sed, se oni deziras registri "mond-rekordon" tiam sendube ĝin tenas niaj s-anoj de Christchurch (N.Z.), kiuj organizis la 14-an Novzelandan Kongreson en 1949 kaj kiu urbo kun 43 Gradoj kaj 30 Minutoj suda latitudo estas laŭ mia scio la plej suda Esperanto-Kongresurbo en la mondo. La ĉi-jara 19-a N.Z.-kongreso okazos en Wanganui, urbo kiu suda latitudo de 39 Gr, 55 Min. ankaŭ kuŝas pli sude ol Bahia Blanca.

—Herbert Koppel.

## KONINDOJ.

Oni ĝis nun ne reeldonis la verkojn de Zamenhof, ĉar la kopirajto de la francaj eldonintoj eksvalidiĝos nur post tri jaroj.

---

"La Normandaj Rakontoj" de Guy de Maupassant (trad. R. Dupuis) aperis ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm 19, Sweden. 210 p.

---

Esperanto estas uzata en la komerca reklamo pli vaste ol ordinare oni opinias. Juristo demandis al ni, ĉu la Esp-a lingvo estas kopirajta. Sciiĝinte, ke ĝi ne estas tia, li ŝajne tiel konsilis siajn klientojn, ke poste aperis uzaĵoj de E-vortoj ĉe fabriknomoj. (Laŭ Amerika E. Mag.)

---

"Plena ilustrita Vortaro" estas preparata de S.A.T. kiel daŭrigo kaj perfektigo de la Plena Vortaro. La 4a eld. aperos jarfine ('53) en oportuna, reduktita formato, kun suplemento. La P.I.V. do prezentos la frukton de longjara zorga kompilado, kun celo esti la plej fidinda konsultilo por la E-istaro.

---

Trifoje sur du paĝoj ("Esperanto," Nov. '53) aperas "englobas" (en senco: ampleksas, comprises); ankaŭ "aviono" kaj "interkona vespero" (social evening).

---

**U. E. A.**
**Universala Esperanto-Asocio**
**La neŭtrala E-organizo.**
**Membro kun Jarlibro 10/-**
**Membreco kun oficiala organo "Esperanto" 25/6**
**Aŭstralia Ĉef-Delegito:**
**S-ro L. E. Pfahl, 37 Seymour St., Croyden, N.S.W.**

**S. A. T.**
**Sennacieca Asocio Tutmonda**
**La laborist-tendenca eduka kulturorganizo.**
**Membreco kun oficiala organo "Sennaciulo" .. .. .. .. 13/6**
**Membreco kun "S-ulo"**
**S-no G. Barlow, 3 Mokari Ave., Somerton Pk., S.A.**

**Kristana Esperantisto Ligo Internacia**
**Membreco kun oficiala organo "Dia Regno" .. .. 11/-**
**Aŭstralia Peranto:**
**S-ro W. L. Illingworth, Box 49, Bruce Rock, W.A.**

**Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista**
**Oficiala Organo: "Espero Katolika"**
**Informojn pri kotizoj ktp. de Kevin Smith, 7 Arbutus St., Mosman, N.S.W.**

---

## POR INFANEDUKISTOJ.

El Japanujo venis bele presita libreto da verketoj faritaj de japanaj infanoj. La eldonejo arde petas, sendi al ĝi similajn el aliaj landoj, en ĉiaspeca esprimformo, por libro en la japana por siaj infanoj, kaj poste en Esp-o por tutmonda uzo. Oni rekompencos per la libro mem. Infana Fako, Heibon-sha 4, Yomban-tyo, Tiyoda-ku, Tokio.

---

## SKRIBU AL LA KOMENCANTOJ!

Ĉu vi sufiĉe korespondas? Ni ne parolas pri viaj propraj gekor-oj sed pri helpbezonaj komencantoj.

En 1941 mi ricevis leteron tre malbone verkitan en E-o. Ĝi venis de Itala soldato en kaptitejo 'ie en Anglujo. Ĉu mi povas helpi lin? Li volas lerni E-on, sed kiel kaptito li ne rajtas peti sendon de lernlibroj. Li povas nur sendi la leteron al mi per helpo de Angla amiko. Do jen problemo: Estas kontraŭleĝe, skribi al aŭ kontakti kun malamikoj. Ĉu mi riskus ĝin? Mi jese decidis kaj sendis al li kelkajn Ital-Esperantajn ŝlosilojn. La studanto iompostiom progresis kaj ni daŭrigis korespondi.

Militfine li revenis Italujon. Mi pensis, ke tio eble estos la fino. Sed ne. Post grava malsano li denove skribis: "Se vi ne respondis al mia unua hezita, aĉa letero, mi certe ne daŭrigus mian studadon de E-o; sed vi ne nur helpis min lerni E-on—vi instruis min en la vera kamaradeco".

Longe pensu antaŭ ol rifuzi respondon al komencanto!

—Laŭ "Worker E-ist."

---

JAM KONTENTA.—Filmaktorino edziniĝis kvarfoje al samprofesianoj. La kvinan fojon ŝi edziniĝis al skulptisto. Poste ŝi renkontis amikinon, kiu demandis ŝin, ĉu ŝi estas kontenta. "Ho jes", ŝi diris, "mi estas tiom kontenta, ke mi decidis edziniĝi estonte ĉiam nur kun skulptistoj."

## THE INNER IDEA: WHAT IS IT?

### Zamenhof's Spirit Informs U.N. Charter.

Hans Jacob's article in "Esperanto" (Dec.) merits wider publicity. And it could have been expanded. Let us examine this motive that impels thousands of people to dedicate themselves to the spread of an ideal, often to their professional hurt. Mr. Honey in Shute's "No Highway" was a master-mind in aeronautics, but he had other, less "respectable" interests—The Pyramid, Anglo-Israelism, planchette and what not—which raised his superiors' eyebrows. But these off-duty researches gave good results. And there are well-placed men whose love for Esperanto similarly incurs the sniffing of their fellows, who are inclined to regard them as starry-eyed Utopians. But like Honey, they will be counted among the seers.

At the Boulogne Congress, 1905, Zamenhof said: "Through the air of our hall move mysterious sounds . . . not audible to the ear, but every receptive soul will feel them; they are the sounds of something great, now coming to birth. Through the air move mysterious phantoms . . . the images of a future time, a time wholly new. These phantoms will soar into the world, become clothed with flesh and power. Our sons shall see them and rejoice."

If words mean anything this comes close to what most people have in mind when they speak of mysticism. The passage strives to concretize in language a relation between phenomena and little known but felt influences operating on planes outside our cognizance. Not since Pentecost had the barrier of tongues been broken, and the miracle amazed the subjects of it. Jacob speaks of the "mystic" of Esperanto, without defining the word; given the truth of Zamenhof's rhetoric, and the validity of the experience since of thousands of Esp-ists, the word seems fitting, so far as its vagueness permits. This element of "feeling", of otherworldly perception, has been, and is, the dynamic of thousands who have learned the language enough to love it.

More prosaically Zamenhof further said (8th Congress): "On a neutral footing it abolishes the walls between the peoples and accustoms men to see each other only as fellow-men and brothers." We would add that the Inner Idea thus expresses that fraternal sense, that humanism, engendered by meeting on neutral language-ground. It is not simply friendship, but a profound feeling of psychic quality between persons devoid of all consciousness of language or other privilege. Its base is neutrality in all things, and so—complete freedom from embarrassment.


"Our labor for Esperanto is motivated not by the thought of its practical utility but only by the holy, great and important idea which the international language has in itself. This idea is fraternity and justice among all peoples. This idea has accompanied Esperanto from the moment of its birth to the present. It moved the author even when he was a small child." So Zamenhof in 1906. These feelings were not shared by a minority, including the powerful Bourlet and de Beaufront, who thought them dangerous and wished to treat Esperanto solely as a practical language without idealistic additions.

Moved by such impulse as the Master's, the active Esperantist judges the affairs of other nationals objectively. He tries to understand the foreigner. He is slow to accept cheap slogans and ready-made demagoguery of the popular press. He analyses, compares and reasons, realising that the language barrier too often precludes a just appraisal of international relations. He knows that an iron curtain has stood between the nations for centuries, and that each people has been and is conditioned by its own press and platform. That curtain will melt only with the coming of a world news-medium based on a freely used speech at the disposal of all.

In the Universal Declaration of Human Rights the world has a potential boon. It considers a man as a man, no matter what his race, color, speech and religion. Some will remark, and rightly, that the attitude of most States does not con-

form to its lofty assertions. The Charter has yet to be ratified by the States and so translated into an instrument of practical policy. But several States have incorporated clauses of it. From the letter to the act is indeed a long step—No one knows that better than the Esperantists who have been striving for more than 60 years. But the ideas of Zamenhof have, in great measure, found expression in the great Charter. May the word become flesh!

—F.R.B.



LA KONGRESANARO.

### VENDO DE BIBLIOTEKO.

Post malmulte da tagoj tiu biblioteko ne plu ekzistos. Tiuj libroj forpasos de la ĉambreto en kiu ili estis gardataj per tiel ama zorgo, kaj disen iros en milon da fremdaj manoj. Ili pliriĉigos aliajn bibliotekojn, kiuj siatempe diseriĝos. Trista sorto de aferoj homaj! Miaj libroj karegaj! Tago venos en kiu vi trovos vin dissternitaj sur vendotablo, de kiu aliaj homoj vin aĉetos kaj posedos, posedantoj eble pli indaj ol via nuna mastro. Tamen, tiuj libroj estas por mi karaj! Mi elektis ilin, unu post la alia, kolektis ilin per la ŝvito de mia vizaĝo, kaj tiele mi amas ilin! Ŝajnas al mi, ke per tiu tre longa kaj tre dolĉa komercado ili jam fariĝis por mi parto de la animo. Sed kion fari? Nenio estas senŝanĝa en ĉi tiu mondo, kaj ni estas kulpaj se ni ne lernis ĝuste el niaj libroj mem: meti supren de ĉiuj bonaĵoj, kiuj pasos, kaj kiujn forportos la tempo, tiun bonaĵon, kiu neniam pasos for—la senmortan belecon, la eternan fonton de ĉia scienco kaj ĉia saĝo (1).

(1) Komparu liniojn de Keats:

> Belo estas vero; ĵen la sum' de via scio
> Sur ĉi tiu tero: ne necesas pli ol tio.

**EASTER ESP. MEETING!** Canberra, Good Friday to Easter Monday. Room reservation: N. Gamble, 27 Froggatt-st., Turner, Canberra.

## POEZIA ANGULO.

Tiuj du vortoj de malbona signifo: Mia, Via". (Don Kihoto, ĉ.3.)

Vortoj du, kun senco fia—
Ili estas: Mia, Via.
Ilin pelu ĝis infero,
Por ke venu pac', libero.
Ĉiu homo—sen propraĵo—
Frate vivu sen domaĝo.
Por ĉiuj greno, vino,
De Parizo ĝis Nankino!
Homoj jam ne plu perfortos,
Kiam Nia, Via, mortos.
(William Morris.)

## AL DIANEMO.

(Robert Herrick.)

Ne fieru, se okulĝemeloj
Brilas, mia kara, kvazaŭ steloj;
Ne fieru pri kaptita koro,
Kiam via restas sen doloro;
Ne fieru pri la luksa tento
De la haroj al amplena vento:
Vidu! tiu ĉi rubena globo,
Kiu pendas de l'orela lobo,
Daŭre restos brila kaj juvelo,
Kiam mortos via tuta belo.
(Trad. B. Clark.)

## TEREZA.

Ho, kara, klar-okula
mia virin' printempa,
tro bela kaj tro juna
al la tombej' silenta
ci iris, iris for,
kien? Tereza!

Kontraŭ kruela sorto
neeblas argumento.
Nin apartigis Morto:
ĉu eblas nun atendi
kuniĝon per la mort'
ree? Tereza!
(Joab Eljot.)

## BIOGRAFIO DE TITO.

Verko de 175,000 vortoj, 444 paĝoj, finfarita en 32 tagoj je rapideco de 1000 vortoj en horo! Jen la tasko de niaj Slovenaj amikoj, kiuj eldonis ĝin. Ili komisiis s-ron Stuttard fari la tradukon. Sub lavango de devoj, tiu heroo ofte laboris du-tri horojn antaŭ la matenmanĝo kaj skribis la lastan paĝon tagojn antaŭ sia tempofikso de ok semajnoj. Ni sendube mendos ĝin amase en ĝia tempo. La traduko estas laŭ Angla eldono.

## MINIATURO.

Fino de Julio. Varmega tago. Mi estis laca kaj soifa. Estus bone trinki lakton acidan. Do mi serĉis tian vendejon kaj ankaŭ trovis. "Molim! mlijeko acida". Ĉar tiom mi jam lernis en Zagreb. La vendistino estis ĉarma knabino. Sed tio ne multe min interesis, ĉar mi jam estas maljuna sinjoro. Tamen—ŝi ŝajnis tre interesi sin por mi! Ĉi mi estas Esperantisto? Certe. Ĉu mi volus helpi al ŝi? Kial ne, feliĉe mi ja scias iom la slovenan lingvon kaj povas komprenigi min. Kaj, ruĝiĝante ŝi venis kun papereto, kiun ŝi montris al mi. Belga kongresano faris al ŝi skriban amdeklaron en Esperanto kaj mi devis traduki. Ŝiaj okuloj brilis. Kiom longe oni devas lerni por skribi Esperanton? Kaj kiel oni skribas: Ankaŭ mi amas vin! Ho Dio!

—F. W. Villach, en Esperanto-Post.

## KLUBAJ INFORMOJ:

**Melbourne Esperanto Club** kunvenas ĉe Henry George Club, 18 George Parade (for de 113 Collins St.) ĉiumerkrede je la 8a. Sek. S-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18 (Tel.: JU 3572).

**Canberra Esperanto Club** kunvenas ĉe "Riverside", ĉiun lastan lundon en la monato, je la 8a. Sek. S-ro N. Gamble, 27 Froggatt St., Turner, ACT. (Tel.: 688 aŭ F 04).

**Sydney Esperanto Club** kunvenas ĉe 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo) ĉiujaŭde je la 8a. Sek. F-ino Edna Dash, 26 Edgeware Rd., Enmore.

**Brisbane Esperanto Society** kunvenas Room 78, Albert House, King George Squ., ĉiun 2-an kaj 4-an mardon en ĉiu monato de Februaro ĝis Novembro, je la 7.30a. Prez. S. L. Parry, Ford St., Albion (Tel.: M6097).

**Okcident - Aŭstralia E-Ligo** kunvenas ĉe Bacton House (ĉambro 16), 723 Hay St., Perth, ĉiun 2-an kaj 4-an jaudon en ĉiu monato (krom Decembro kaj Januaro) je la 8a.

**Devonport Esperanto Club** kunvenas ĉe Adult Education Rooms, ĉiulunde je la 8a. Sek. S-ro M. W. Ives, Box 24, East Devonport, Tas.

CITIZEN PRINTERS, CAMBERWELL

# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

**Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.**

**Jarkotizo: 12½š (aŭ 20 respondkuponoj).**

**Anoncoj: Tri linioj: 4š.**

**Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.**

**Vol. 11, N-ro 61.** MELBURNO. **Marto - Aprilo, 1954.**

## ESPERANTO IS BACK IN THE NEWS

**Edmond Privat, Ph.D., Professor of English Language and Literature at the University of Neuchatel, Switzerland.**

The press does not talk as much about Esperanto as it did. The inter-language has ceased to be "new". Newspapers no longer consider it newsworthy when a congress or international conference conducts its meetings in Esperanto or when some school in Brazil or Japan puts it into its curriculum. It happens too often to stir up a sensation. Regarded for a long time as a utopian enterprise, the language has developed, and spread quietly but steadily.

Those of us who learned it before World War 1 can point out that Esperanto has undergone a remarkable evolution. It is richer and is spoken with much more precision and elegance than thirty or forty years ago. Many students, workers, teachers and specialists witness to the high degree of uniformity that has been achieved and the ease of discussion that it affords, unhampered by the endless translations that characterise multilingual conferences.

If Esperanto were taught in schools more time could be spared for deeper analysis of everyone's mother tongue as well as for the study of some modern or classical tongue. Culture would gain from this. To-day much time and effort is wasted on language learning by inadequate methods, and at international conferences English, French and Spanish are painfully read from prepared manuscripts by speakers suffering from the inferiority complex that almost everyone has when he speaks in a language not his own.

Perhaps Esperanto is spoken so fluently and elegantly at international conferences because it liberates its users from this complex. It enables delegates from countries other than the U.S., Britain and France to play the role to which they are entitled. Scandinavians, Brazilians and Japanese express themselves on a basis of equality with English- and French-speaking representatives.

Another factor in the success of Esperanto is the facility of forming words freely by the use of suffixes and prefixes. With a few roots having a high degree of internationality in the West, every speaker can form his own derivatives. This makes the language attractive to Orientals, since they have to learn only a limited number of basic words.

A language cannot be manufactured; it must grow through steady use. Dr. Zamenhof, an initiator, not a creator of the interlanguage, chose the basic elements and let life do the rest. The Esperanto Academy ratifies from time to time the use of new words, especially technical terms which have been introduced into reputable publications. It watches over the unity of the language.

Some persons who have never heard a speech or debate in Esperanto imagine that the language sounds like a somewhat barbarous mixture of diverse language elements. The truth is that it is sonorous like Spanish and flows evenly like Rumanian. Let us not forget that English, too, is a

mixture of Anglo-Saxon and French elements that merged during the 14th century.

Forceful speakers, and writers of good taste, express themselves in Esperanto with as much elegance as in their native tongues. It is a great pleasure to read articles and books written directly in Esperanto by Chinese, Japanese or Dutch authors. Few persons, even among learned university graduates, would dare to publish anything in a national language not their own.

When I was a student people used to tell me that it would never be possible for a Frenchman to understand a Slav, or for an Englishman to understand an Italian, in Esperanto. Experience proved this assumption completely false. The more Esperanto was used, the more uniform became its style and pronunciation. I am sceptical about the predictions of scholars when they presume to judge matters which they do not know from ..ect conversation.

UNESCO has recommended an objective study of the facts. If the Governments could agree on a gradual introduction of Esperanto into the schools the movement would advance by leaps and bounds. If they cannot reach such an agreement, the language will still spread, but presumably at a slower pace, and will consistently benefit from the experience gained in 65 years of steady growth.

UNESCO is particularly interested in the fact that Esperanto helps to develop a clearer consciousness of world citizenship and opens the door to a deeper understanding of world affairs and a better appreciation of other civilisations. My own experience has taught me this, and thousands of others can say the same.

(From "Amerika E-isto.")

---

## PREMIO MASEL POR 1954.

### Al ĉiuj Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

---

## PROZA KONKURSO.

PREMIO: £5 por la plej bona originala literatura verko en Esperanto. La temo estas tute libera. La verko devas esti inter 1000 kaj 1500 vortoj.

La Konkurso fermiĝos je la **30a de Septembro,** 1954.

Ni anoncos la rezultojn en Decembro. Ni krome informos individue la konkursantojn per poŝto pri la rezultoj, kaj la Premio estos transdonota al la venkinto.

La juĝo, sen rajto apelacia, estos en la manoj de juĝanto elektota de la Komitato de la Ligo.

La Kandidatoj devos sendi siajn verkojn titolitaj, sed sennomaj, kaj aparte devos enmeti en koverton, sur kiu estu skribota la titolo de la verko, papereton kun la kompleta nomo kaj adreso de la aŭtoro. Nur tiel ni povos konservi la sekreton de la nomoj de la konkursantoj. La aŭtoro devas konservi kopion por ŝin protekti kontraŭ perdiĝo de la sendita ekzemplero.

La verkoj devas esti maŝinskribitaj kun interlinia spaco, aŭ tre klare manskribitaj. Se eble, ni publikigos la sukcesajn verkojn en Esperantaj gazetoj.

La sekretario de la Ligo en Perth ricevos korespondadon rilate al la Premio. Se nur unu verko estas ricevita, la sekretario nuligos la konkurson por tiu jaro, kaj konservos la verkon por la konkurso en la sekvonta jaro.

Neniu Esperantisto kiu jam dufoje gajnis la Premion rajtas partopreni.

Bonvolu tiri la atenton de ĉiuj klubanoj al la supra afero!

—(F-ino) E. M. Bull, hon. sek.

---

## STAFET-KURADO.

### Prelego de S-ro Gottlieb, kiu legiĝis ĝin antaŭ la Kongreso en Perth, Januaron, 1954.

Jam kelkjardeke ni, la maljuna generacio de fidelaj E-istoj, kuradas kun la flamanta torĉo. Ni nun serĉas posteulojn, la junan entuziasman generacion, kiu portu nian strafeton al la celo. Ni veteranoj havas **estintan historian** valoron. Ni batalis multe da jaroj kaj nun, lacaj, havas la deziron: surmeti niajn taskojn sur junajn ŝultrojn, ke ili portu niajn aspirojn al plena efektiviĝo.

Serĉi, kolekti kaj organizi tiajn novajn pionirojn—jen por ni la plej grava tasko. Ne plu sufiĉas kunveni regule en klubo aŭ asocio, aŭskulti parolojn aŭ prelegojn en E-o kaj kanti niajn himnojn. Tiuspecaj amuzaĵoj decas al babilada klubo, "kart-partio", bilardunuiĝo kaj similaj; sed ni, maljunaj batalantoj por tia sankta heredaĵo—nia perfekta internacia lingvo—havas pli altan celon, atingotan en la plej

proksima estonteco, kaj ni ne povas ripozi kaj kvietiĝi ĝis la tago, kiam niaj aspiroj estas plene atingitaj. Se ni ne sukcesos transdoni nian flamantan torĉon al nova, aktiva juna generacio, niaj penadoj vaniĝos, nia stafeta kurado ĉesos en la mezo de la polva ŝoseo, nia torĉo estingiĝos kaj niaj grandiozaj esperoj fariĝos senenhava sonĝo.

Ne sufiĉas enmeti malgrandan anoncon en loka gazeto kaj atendi ĝis kelkaj ŝcivolemuloj venos al ni por sidi en E-kurso, kiun parto de ili forlasos, kiam la lernado ŝajnos al ili ne tiel facila, kiel ili imagis.

Ĉiuurbe ni devas esplori kaj trovi la niacele plej utilajn rondojn, kaj per ĉiu rimedo ilin penetri. Junaj studentoj, instruistoj, scienculoj estu nia ĉefa celo, kaj gajni ilin—nia ĉefa tasko.

Unu fojon en la jaro ni devas aranĝi "Esperanto-semajnon", se eble —manifestacion. Cie, kie niaj grupoj ekzistas, aŭ kiun niaj grupanoj povas atingi, flugfolioj estu disdonataj en lernejoj, universitatoj, inter intelektuloj. La junularo ofte enuiĝas, kaj serĉas ne tre laŭdindajn amuzojn. Por tiaj E-o estos kaj eduka kaj distra rimedo.

En Eŭropo ĉiu plenaĝa grupo pensas aligi al si "junularon sekcion". En La Rondo ni reservu kolon por JUNULARO, kaj ĉiu grupo konkuru por gajni kiel eble plejmulte da junuloj. Ĉiumonataj raportoj en niaj kunvenoj kaj gazeto pri tiu varbado instigos al konkurado. Se loko ne havas eminentulon por propagando kaj instruado, najbara loko tian personon povus "pruntedoni". Lia agado: viziti administraciajn kaj edukajn centrojn kaj ricevi permeson aranĝi kaj gvidi E-kursojn ĉe oficistoj kaj lernantoj.

Oni ofte diras: "Esperanto ŝajnas ree dormanta kaj ankoraŭ malmulte progresas." Ke E-o ne estas ankoraŭ oficiale rekonita, tute ne montras, ke ĝi estas netaŭga, sed ke la oficialuloj estas spirite maltaŭgaj por tiu altspirita ideo. NI estas la progresemaj; tiuj estas la postrestuloj. Sed venos aliaj, pli kapablaj kaj altanimaj, tiam ni venkos!

Kun ĉiamkreskantaj internaciaj bezonoj, internaciaj kongresoj, konferencoj politikaj, ekonomiaj, sciencaj, teknikaj, la ekstrema neceso de internacia lingvo estas superlative evidenta! Ĉiutage pli kaj pli da individuoj akceptas E-on, ĉar ne ekzistas pli bona, pli evoluinta interkomprenilo lingva.

Tamen, ankoraŭ ĉe UNO delegitoj sidas kun telefonoj ĉeorele, nekomprenante unu la alian, aŭdante malĝustajn tradukojn de diverslingvaj istoj, milmaniere turmentante sin, anstataŭ uzi la klarespriman, belan lingvon E-o.

Al nova generacio ni, la batallacaj, volas transdoni la stafeton, la flagre flamen torĉon, kun plena certeco, ke ili portos ĝin rekte kaj sensancele al la fina glora venko!

---

## A.E.A. BOOK - SERVICE.

Order your Esperanto-Books from your nearest Book-Agent:

Victoria and Tasmania: Mrs. O. Glenie, 90 William St., St. Kilda, Vic.

South Australia: Miss W. Addis, 25 Greville Ave., Flinders Park, S.A.

Western Australia: Miss E. Chandler, 5 Todd Ave., Como, W.A.

Canberra: Mr. S. Fulop, 6/10th St., Narrabundah, Canberra, A.C.T.

N.S.W.: Miss F. Smith, 50 Fitzroy St., Milson's Point, N.S.W.

Queensland: Miss E. B. Carrick, 167 Lytton Rd., East Brisbane, Qld.

All these agents carry a good supply of the most popular Esperanto-books. Special books can be ordered from overseas by contacting our Chief Book Agent: Mr. E. Hearne, 14 The Corso, Parkdale, Vic. Please enclose return postage.

---

Karaj Gesamideanoj,

La progreso de nia movado ĉiam dependas de la sindonemo de la samideanoj, kiuj tiel efike sin dediĉas al la malfacilaj taskoj sen ia ajn penso pri persona gajno kaj, bedaŭrinde, ofte sen la meritita danko. Ankaŭ en Aŭstralio ne mankas tiaj bonuloj. Ĉe la nuna momento mi precipe pensas pri F-ino Winnie Addis, kiu dum la lastaj kvar jaroj tiel bone direktis nian libroservon.

Komence ŝi alprenis ĉi tiun deĵoron nur por komplezi, kiam S-ro Hillerman tiam devis al iu transdoni la oficon, sed, spite al nebona sanstato, ŝi bonege faris tiun laboron dum kvar jaroj. Nome de ĉiu aŭstralia Esperantisto mi deziras ŝin elkore kaj arde danki.

Kvankam ŝi transdonis la oficon al S-ano Eddie Hearne komence de ĉi tiu jaro, ŝi ne tute rezignis, ĉar ŝi ankoraŭ restas libroperanto por Sud-aŭstralio. Cetere ŝi laŭdinde sin dediĉas al la devo ĉion bone klarigi al sia sekvanto.

Ankaŭ al S-ro Hearne ni deziras esprimi nian dankon. Li estas tre okupita homo, sed al tiaj kutime ŝuldas la plej multon ĉiu movado. Feliĉa li estas, ke li havas tian bonegan anaron da perantoj, kiujn ni devas ankaŭ inkluzivi en nia danko, ilin menciante pernome:—F-ino E. Chandler (W.A.), S-ino O. Glenie (V.), S-ro S. Fulop (A.C.T.), F-ino E. B. Carrick (Q.) kaj F-ino F. Smith (N.S.W.), kies antaŭulo estis S-ro A. Towsey.

Havante tiajn laborantojn nia movado neniam paŭzos en sia progreso. Ĉiu montru sian dankon per la plej fervora subteno.

Via Prezidanto,
KEN. G. LINTON.

---

**SUBSCRIPTIONS RECEIVED.**

Mesd. Kluessendorf, Koppel, Glenie, Turnbull, Hall, Le Coultre, Pollard, Sedgley 12/6, Hill 6/3; Misses Proctor, Calwell, Samblebe, Willans, Larkin, Sinclair, Bull, Longson, Gibson, Strempel, E. Chandler, Dr. V. Summers 12/6; Messrs. Finch (donation) 10/-, Prewett, Beresford, Lanyon, Koppel, Crowe, M. H. Cohen, McKenzie, O. Davies, Kew, E. Smith, Towsey, Thompson (W.A.), Hehir, Stevens, Hawks, Claxton 12/6; L. Pfahl 15/-; Burstin (donation) 10/-, A.C.H. (donation) 6/-; Sales Rondo 6/-. Our sincere thanks.

---

SPECIAL THANKS to Mr. Allan Turner for his gift of £5.

CANBERRA: Successful Conference at Easter! Report follows.

---

**KLARIGO!**

Pro malfeliĉa okazo, nome poŝta perdo de manuskriptoj, kaj mia longa nescio pri la afero, La Rondo ne aperis laŭ la intencita dato. Tio estas tre malagrabla por ni. Espereble ni aperigos plurajn numerojn antaŭ la jarfino.—F. R. Banham.

# Australia Kroniko

● **PERTH:** Aliĝis al kurso pli ol 30 komencantoj sub gvido de S-ro A. Saar. Nova kurso por progresintoj gvide de S-no G. Pollard estas 12-ana. Por profiti la intereson vekitan de la kongreso, la Ligo restarigis korespondan kurson por komencantoj sub la aŭspicio de A.E.A.

La unua monata kunveno de la Ligo ĉijare okazis 11 Marto. Interese, amuze parolis la prez-o, S-ro J. Hawks, pri siaj spertoj dum vizito al Irlando.

20 Marto okazis interamika vespero. Interesan prelegon, kun lumbildoj, pri nelonga vizito al Eŭropo donis D-ro Gentilli. Sekvis ĉarma muzika programo kaj bonega vespermanĝo. La multnombra ĉeestantaro sin ĝue distris.

Kun bedaŭro ni raportas pri gravaj malfaciloj ĉe la sekretarieco de nia Ligo. Nia sek-io, F-no Bull, okupata pri studado, ne plu povas daŭrigi la taskon kiun ŝi bonege plenumis jam de sia enoficiĝo en Decembro, 1952, kaj ŝia brava helpanto S-ino A. B. Sedgley, pro malbona sanstato, ankaŭ devas ĉesi siajn devojn. Feliĉe nia kasisto, F-ino A. Longson, bonvolis akcepti dumtempe la respondecojn de la sekretarieco. Ni varme deziras al F-ino Bull sukceson en sia studado kaj al S-ino Sedgley plej baldaŭan refortiĝon.

Post la kongreso ni respiras kaj pretigas nin por instrui la multajn personojn, kiuj deziras lerni la lingvon. La kongresa propagando estis tre bona, gazete kaj radie. Ĉirkaŭ 30 homoj en du klasoj komencas lerni la lingvon. Multaj demandoj pri E-o venis el la kamparo.

Denove ni portas E-on al la malsanuloj ĉe Wooroloo Sanatorium. Multaj tie bone progresas, kaj tre feliĉas pro la nova intereso.

La rondeto de Darlington, sub gvido de S-ino Sedgley, estas lerte lernema klaso.

Por fari ekspozicion helpan al infanoj lernejaj tra la ŝtato, la Eduka Fako en Okc. Aŭst. uzos la desegnaron de S-ro Chandler, kiu formis la grandan parton de nia kongresa ekspozicio.

25 Jan., S-ro Kevin Smith el Sidnejo alvenis al Fremantle per ŝipo Strath-

eden survoje al Eŭropo. S-ro N. Brodie kaj S-ino Sedgley renkontis ilin ĉe la ŝipo kaj kondukis lin peraŭte tra multe de mejloj por vidi la bonajn partojn de Perth kaj la ĉirkaŭajon. Li vidis nian belan riveron Swan, la marbordojn, belajn konstruajojn kaj nian novan ponton trans la Swan. Li luncis en King's Park, kie li renkontis multajn el niaj anoj. Poste S-ro Strassburg kondukis lin per aŭto al la lernejo, kie Doktorino Vera Summers instruas, kaj de tie al la ŝipo.

Ni tre ĝuis la viziton de S-ro Smith. Li diris, ke li certe ŝatos reveni al Perth por longa resto.—E. BULL.

---

● **SYDNEY:** En Novembro vizito de S-ro Kim el Korea! Li kaj grupo de aliaj eksterlandanoj estis en Aŭstralio pro inĝeniera projekto de UNO. Tre interese li parolis pri sia hejmlando, la popolo, lingvo, kaj kondiĉoj. La Koreanoj, li diris, volas vivi sian vivon sen la perforta altrudo de ia ajn ekstera helpo.

Ses kandidatoj prezentiĝis al la 1953 Pyke Memoriga Ekzameno. Ni kore gratulas ilin pro bona laboro. Apartajn gratulojn al S-ino Allgood, kiu gajnis la Pyke Premion. Brave! por S-ino Jackson, kiu gajnis atestilon malgraŭ tio, ke ŝi helpas konstrui sian domon kaj zorgas pri edzo kaj tri energiaj infanoj.

S-ro Sullivan el Canberra feriis en Sydney en Decembro, kaj ni ĝuis de li viziton.

La Zamenhof Vespero okazis je la 12a de Decembro; 80 personoj ĉeestis. La bone aranĝita programo plaĉis al ĉiuj.

La kuko, ornamita per verda stelo, kiun faris S-ro Chandler, tre bongustis. Ni nomis F-inon Smith nia delegitino al Perth, kaj prezentis al ŝi monsumon pro longa kaj fidela servo al la Movado. Parolis S-ro Hamilton Webber, Esperantisto de post 1913, kaj li inspiris nin per vortoj pri la progreso kaj nunaj taskoj de Esperanto.

Inter la gastoj troviĝis Gesinjoroj Rutland, kiuj deklaris sin Adelaideanoj. Tamen, ni bonvenigas ilin, kun la espero ke Sydney povos denove allogi kaj teni ilin.

---

Kelkaj niaj anoj veturis al la Pertha Kongreso, kaj ĉiuj ĝuis la kelkajn tagojn en Esperantujo. Ni hejmuloj partoprenis post ilia reveno, per kolorbildoj de S-ro Matasin, kaj raportoj de la partoprenintaj feliĉuloj.

Poste, ni havis plezuron aŭdi Kongres -paroladon de S-ro Towsey pri instruado de Esperanto. Ĝi estis registrita per drataparato, kaj tiel ni profitis ne nur pro bonaj teoriaj ideoj, sed ankaŭ pro la klara parolstilo.

En Februaro ni urĝe komencis reklamon pri nova kurso por komencantoj, kiu komenciĝis en Aprilo. Krom disdonado de flug-folioj, ni aranĝis kelkajn paroladojn kun helpo de S-roj Parry kaj Rutland. S-ro Schwerin denove gvidos la kurson laŭ "Ĉe-Metodo."

Nia Jarkunveno okazis en Marto. Re-elektitaj: Prez.: S-ro Matasin, Vic-Prez.: F-ino F. Smith, Kas.: S-ino Klussendorf, Sek.: F-ino E. Dash, Bibliotek: F-ino F. Smith, Novaj oficistoj estas Vic-prez.: S-roj W. Chandler kaj M. Zvara, Soc. Org.: S-ino Matasin kaj S-ro Gunning.

La Klubo donacis £10 stg. al la Fondaĵo Montevideo. Krom tio, ni kolektis pli ol £3 por tiu celo. Se la Montevidea Konferenco favore decidos, tio estos tre grava antaŭenpuŝo.—E.D.

---

● **BRISBANE:** Plensukcesa Zamenhofa Festo aranĝita de la Brisbana E-Societo okazis ĉe Hotel Canberra la 15an de Dec. En prezidanta parolado S-ro S. L. Parry esprimis dankojn de la Estraro pro la ĉiuflanke ricevitaj bondeziroj rilate al la revigligo de la ĉi tiea movado.

Vic-prez. S-ro A. D. D'Oliveyra, per inspira parolado, bonvenigis veteranon de la Brisbana movado, S-ron N. G. Mills, D.B.E.A., kaj S-inon Mills. Aklamo, kiu sekvis la respondon de S-ro Mills certigis al li la ĝojon de la membroj denove vidi lin inter niaj vicoj.

Radia dissendo el Stacio 4BK aranĝita de S-ro E. G. Littleton kaj parolita de S-ro S. L. Parry kompletigis la ĝuindan Feston de 1953.

---

● **CANBERRA:** Antaŭ unu jaro E-kurso finiĝis en la Katolika Klubo Junulara en Canberra. Gvidis ĝin S-ano S. Fulop. Ĉiuj el la ses gelernantoj sufiĉe bone lernis ne nur legi sed ankaŭ paroli. Post la kurso entuziasmo pri E-o pli fortiĝis, tiel ke jam du fraŭlinoj decidis fari grandan vojaĝon al Eŭropo, vizitante multajn

laŭdojn. 24 Marto 1954 la du fraŭlinoj forvojaĝis; antaŭe artikolo aperis en Canberra Times, en kiu ili sciigis al siaj amikoj, ke ili uzos E-on kiel internacian lingvon.

Estus saĝe ankaŭ por aliaj gejunuloj, post lernado de E-o, vojaĝi al iu kontinento por vidi, sperti kaj lerni pli multon pri la vivo de aliaj popoloj kaj poste uzi ĝin por la bono de Aŭstralio.

## DE LA REDAKTEJO.

La aranĝon kaj parte la enhavon de N-ro 60 respondecas la antaŭa redaktoro (F.R.B.), kiu konsentis repreni la laboron post dujara paŭzo. Li penis plaĉi al ĉiu kultura tavolo, per uzo de simplatemaj kaj pli pensigaj legaĵoj. Certe la komenculoj bezonas nutron; ankaŭ la supozinde-progresintoj, da kiuj, post 30-jara E-gazeteldonado en Aŭstralio, devas jam resti konsiderinda nombro. Ni denove emfazas la dezirindecon, ke homoj kun ideoj regule versŭ ilin en la Liberan Forumon. Pepoj, blekoj, gruntoj, murmuroj, laŭdoj, ĝojkrioj, admiresprimoj, vort-bukedoj, ĉu flugu al tiu kolono! Nur per vigla, viveca, komuna partopreno en la gazeta kompilado, nia organo elspiros inspiron al ĉiu ĝin leganta. Se vi ne ricevas la gazeton, instigu al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne; se vi ricevas ĝin, ne pagante abonon, sendu 12/6 al S-ro McKenzie, kaj dormu bone. Nia maŝino ne funkcias sen petrolo. Jen decida jaro: ni ĉiu penu la plej eblon por starigi la financon sur firma bazo. Nia bonstato kiel E-organizo, ja eĉ ĝi, efikas sanige sur la mondsituacion ce la movado universala.—Redaktoro.

ĜUSTIGOJ: p. 52. Malgraŭ mia atentigo, la presisto ne fortiris la linion "Give Books for Christmas." Tamen la linio enhavas ĉiam-validan sencon, ĉar tre bone vi agus, mendante E-libron por via amiko donacotan en tiu festa tago en kiu ajn jaro! p. 46, linio 3, metu "Liverpool" antaŭ "University". Ankaŭ tio estas presista eraro.—Red.

## HISPANA "BOLETIN"

(Dec-o) kun sia kutima ĝentileco metas rozojn sur nian vizaĝon, dirante: "Aŭstralio, la insulkontinento de la kanguruoj, sin prezentas per La Rondo, ĉiam vigla kaj dinamika, ĉiam kun bona enhavo, el kiu povus represi multajn fragmentojn . . . ."

## NEKROLOGOJ.

### S-ro C. W. Ballard.

Mortis en la 23a de Aprilo en Caulfield (Vik.) nia fidela amiko Charles William Ballard, 86-jara. Naskiĝinta Anglo, li E-iĝis iam post 1910 kaj estis frua redaktoro de La Suda Kruco (fondita 1920).

Ĝis la finaj jaroj de sia vivo li regule alestis la centrajn kunvenojn de E-o, ageme penante fari la plejeblon por nia movado. Profesie kontisto, li havis multajn interesojn. Li estis arda ekleziano kaj en la frua tempo eminentis en Framasonaj rondoj.

La patra ekzemplo de vivo multfaceta kaj servopreta efikis sur lian filon, S-ro Bertram C. Ballard, M.A., LL.B., tre bona E-isto kaj nun Aŭstralia ministro en Siamo.

Al ĉiu parenco esprimas kondolon ankaŭ ni, liaj E-aj amikoj.

### S-ro T. F. Keenan.

Kun granda bedaŭro ni anoncas la subitan morton je la 25a de Aprilo 1954, de nia kuratoro, S-ro Thos. F. Keenan, en la aĝo de 44 jaroj.

Kvankam li E-iĝis nur antaŭ ok monatoj li estis tre entuziasma pri nia afero, li havis firman kredon en ĝia fina venko, kaj tiucele forte laboradis, kaj oferis multe da tempo kaj mono por helpi la movadon ĉi tie.

Pro iome neortodoksaj metodoj de li uzitaj, ne ĉiuj konsentis kun li, sed, per la rezultoj, montrigis ke li pravis, kaj "tra densa mallumo" li rekondukis nian Societon en la plenlumon kaj sur firman teron.

La ĉitiea movado tre multon ŝuldas al li, kaj la tuta E-a movado estas perdinta valoran kaj fortan batalanton.

Al li, kiu forpasis de ni, ĝuste en tiu tago, kiam ni funebris la bravulojn de milito alispeca, ni diras: "Ni memoros vin."

—S. L. PARRY, Brisbane.

# Tra La Mondo

POLAND: Helped by the U.E.A. (Geneva), Polish Esp-ists have restored the Zamenhof monument in Warsaw. It had been damaged and neglected during the war.

BRITAIN: The popular cantata "Bethlehem", by Maunder, translated into Esp-o, was given at the French Protestant Church in London, 13.12.

HOLLAND: Dr. W. Drees, Prime Minister, expressed in a Dutch daily his firm belief that Esp-o should be taught as a second language in schools. At Utrecht Uni. Mr. ten Seldam appended a 75-page summary in Esperanto to his thesis on Compressed Atoms. This practice is significant and merits every inquiry at the sources.

AUSTRIA: To mark the 50-Year Jubilee of Esperanto in Austria the Post printed in June a new Esperanto stamp and special envelope. Write Austria Esperantista Federacio, Fuenfhausgasse 16, Vienna XV.

SWEDEN: Ten newspapers are publishing serialised Esperanto lessons.

BRAZIL: Youth magazine "Sesinho" (Rio de Janeiro), published by the National Service for Industrial Apprenticeship with circulation of 100,000; Wir und Die Welt (Vienna), Novini Mladih (Zagreb) too are giving Esperanto lessons to their youthful readers. The military college of Rio de Janeiro introduced elective Esperanto classes in May, 1953. Demand so great that the beginners' class is taught in three sections under three teachers.

JAPAN: President of the Imperial Uni. of Tokio, Dr. T. Yanaibara, urged Esperanto in interview with Japanese "pen friends":—"If you use Esp-o in your correspondence you will overcome the language handicap and will not have to humiliate yourselves before Westerners."

GREECE: Esp-o taught in 14 high schools, two teachers' colleges, and the College of Economic and Commercial Sciences.

FRANCE: Esperanto in the elementary schools of Alsace (Haut-Rhin and Bas-Rhin) for children who do not take German. "Franca Esperantisto" says 63 streets and squares in a number of countries are named after Dr. Zamenhof. In France 19 of them.

YUGOSLAVIA: In 1953 the Govt. issued three Esperanto stamps—two for Y.S. (one 15-dinar and one 300-dinar airmail) and one for Y.S. zone in Trieste (15-dinar).

---

KORESPONDADO: S-ro K. Wakamatsu, Kami-meguru 6-1375, Meguro-ku, Tokio. p.m., p.k., gazetoj kaj ĉiuj objektoj.

# Recenzoj

**"NI NE POVAS SILENTI!"**

**Eld. Esperanto-Kinkjuŝa, 87 Matuba, Miya-tyo, Aiti-ken, Japan. 40 p.**

En 1952 grupo da japanaj sciencistoj ekiris al internacia kuracista kongreso en Italujo por doni siajn konstatojn pri la atombomboj sur siajn urbojn. Malgraŭ supozita bonvolo de la itala registaro al ilia partopreno en la kongreso, ĝi subite malpermesis la kunvenon, evidente pro premo de alia ŝtato. La japanaj prelegoj estas nun en E-a traduko, kies atesto terura skuas la animon de ĉiu kuraĝanta plenumi la devon ĝin legi.

Sur epitafo ĉe Hiroŝima estas: En kvieto vi ripozu; ĉar la eraron ni ne ripetos!

Se la nacio, kiu faligis la inferbombojn, patronis aŭ aprobis tiun moralaĵon, oni rajtas demandi, por kio do ĝi, kun aliaj, ankoraŭ komercas en tiaj diablaĵoj? Efektive, la "eraro", ripetita, signus la morton de la mondo, almenaŭ en la formo kaj ordo en kiuj ni nun scias ĝin. Estas certe, ke atomomilito rezultigus, ke centmiloj da usonanoj kaj britoj, cindrigitaj kaj agoniantaj, torde kuŝus en maro da radio-aktiva koto, sub ruinoj de ne du, sed dekoj da urbegoj. Se ekzistus presejoj dum aŭ post tiu katastrofo, ne japanaj kripluloj, sed niaj propraj filoj provizus, al hazardaj transvivuloj, la bildan ateston de nia satana frenezo.

Ke oni konstruas la materialon por tiu fina "traro" (kiele tromoderega esprimo!), ni legas hodiaŭ per raporto pri provizo de atomartilerio al la brita armeo. Ekuzo de ĝi signalus komencon de afliktego nepriskribebla por la homa raso—certe por la teknike evoluinta parto. Restus nur la industrie treniĝantaj regionoj.

Tiuj, kiuj lasas sin dubiĝi pri la vorto "paco" en la postparolo de la verketo, sub impreso, ke ĉiu "paca" organizo estas suspektinda, faras al si ofendon al la racio. La faktojn prezentitajn de la tri japanaj doktorojvidatestintoj neniu rajtas ignori. Ilia terura priskribo devus, ja devas, ŝoki la mondon en tiun staton de vekiĝinta moralkonscio, sen kiu ni kune marŝas en flaman neniecon. Kiel fimorala marasmo kreskas la paraliza penso, ke jam la homoj metas la manon sur potencon, kiu povas detrui la teron

mem! Kiel savi nin, se ne per agado inspirita de eĉ pli alta Potenco, kaj gvidado de fidelaj libroj kiel tiu ĉi?

—F. R. Banham.

**"Fajrolumo ĉe la Fronto"**: 148 p. Prezo ne indikita. Valora verko de Ĉino Lui Beju, en bona traduko de S.J. Su. Per flame viglaj vortbildoj li pentras la lukton de la Ĉina popolo dum la longa milito, kiu fine unuiĝis la nacion. Malgraŭ la muro de l'ideologio, neniu homo povas rifuzi al si la privilegion legi per rekta vojo la sentojn kaj aspirojn kaj agstreĉojn de tiu giganta hombloko, kies amikecon ni nepre devas havi, se ni ne volas starigi al ni ankoraŭ unu teruran kontraŭforton en la universa politiko. La sorto de E-o en Ĉinio grande dependas de vasta intereso en verkoj, kia la nuna, kiun subvenciis la registaro per la Ŝanhaja E-Ligo, P.O. 636, Shanghai, al kiu ni skribu.

LA BAPTO DE CARO VLADIMIR. El la Ĉeĥa tradukita kaj komentariita de Tomas Pumpr. 144 p., 53 desegnaĵoj. 13/3, plus sendkosto. La Dua Stafeto-eldono.

Strofoj satiraj pri la despotismo cara, en kiuj la tradukinto atingis mirindan sukceson je la trafa rimo kaj neta esprimformo. Ĉiu admiranto de la vortjonglo kaj evoluigo de la latentaj uzebloj de Esp-o ne domaĝus la prezon de tiu majstra prezento. Se leganto estas piemulo, li devos pardoni la cinikaĵojn, pro la superhoma manipulo de la lingvo kaj la malboneco de tio, kion la poemo tiel juste atakas. (Mendu ĉiujn librojn per niaj agentoj.)

## PRI "KAPABLECO."

"Nia lingvo kapablas ĉion!" krias S-ro W. Auld. Verdire ĝi estas mirinde fleksebla kaj esprimriĉa medio por la nuanca komprenigo. Sed ĉu niaj tradukantoj, eĉ eminentaj, ĉiam kapablas en sia uzado de tiu instrumento? Ne nur en la poezio sed ankaŭ en la scienco, oni tro facilanime lasas sin tiriĝi al nenecesa uzado de neologismoj. Scio pri fremdaj lingvoj havas en kelkaj cerboj pli da loko ol lerta elekto kaj kombino de Esperantaj elementoj. Unu ekzemplon: Tradukante la biologian "externalise," kial homo elektas novan formon, kia "eksternalizi"? -IZ signifas nur "provizi per . . ." Jam pretas "eksterig-igi" (aŭ sen streketo). Tio signifas: igi, ke io eksteriĝas (to set in motion, induce, a state of becoming outward). La formo -iĝigi estas tute konforma kun la spirito de la E-a vortfarado. Li moviĝigis la rokon, tie. li igis la rokon moviĝanta. Tio ne estas samsenca kun "li movis la rokon". Moviĝigi rokon: igi rokon en staton de moviĝ(antec)o. Komparu: "mi igos vin fariĝi kaptistoj" (mi fariĝigos vin -oj), Marko 1/17.

—Robo.

## NOVE VENINTO?

T. Jung "Lingva Kritiko," Junio, 1933) opiniis: "Mi ne vidas eraron en tio, meti adverbon apud substantivon. Do: bele skribanto, multe parolantoj, supraĵe pensanto. Bele skribanto ne ĉiam estas bela; multe parolantoj ne ĉiam estas multaj, sed eventuale povas esti nur du. Kiun ŝokas tia formo, tiu metu streketon inter adverbo kaj substantivo: bele-skribanto k.c. Aŭ kunigu ambaŭ formojn, forlasante la adverban finaĵon: belskribanto, multparolantoj."

Nu, pri kelko el mia propra esplorado. En Dancu, Marionetoj, Baghy uzis "senmove staranton"; Dietterle en Originala Verkaro, p.6, "science studanto." En la Biblio Jesaja 29/24, 66/2; Jeremia 51/52; Jeĥekiel 30/24: spirite-afliktito, mortevundito, spirite-erarantoj k.c. Sentencoj 28/4: fremdeloĝanto; Psalmo 68/12: hejmesidantoj. Komparu: unuenaskito.

Komparu ankaŭ fremdeloĝanto, sed longatempeco (Readmono 30/20); akvapelita (Fabeloj de Andersen, vol. 1, 305, -2). George Gordon uzis "trelongeco" por "very great length" ("pro ĝia trelongeco mi ne povis porti ĝin).

Jusveninto, preskaŭ-nuduloj, Ijob 22/6. Jen adverboj rekte apud substantivoj. Kial ĉikani pri la -e?

Rimarku krome, ke ne ĉiu noveveninto estas ĵusveninto. La unua povas esti nova membro ĉe la klubo; la alia estas simple homo, kiu ĵus venis.

Mi opinias, ke estas en la substantiva participo sufiĉe de verba forto por rajtigi la senperan aligon de la adverbo.—F.R.B.

CITIZEN PRINTERS, CAMBERWELL

# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

**Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.**

**Jarkotizo: 12/6 (aŭ 20 respondkuponoj).**

**Anoncoj: Tri linioj: 4/-.**

**Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.**
**Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.**

**Vol. 11, N-ro 62. MELBURNO. Majo - Junio, 1954.**

# Australia Kroniko

## SUKCESPTENA ESPERANTO KONEFRENCO EN CANBERRA (16-18 Aprilo, 1954)

Post la Perta Kongreso la estraro de la Canberra E-Klubo afable akceptis proponon de la A.E.A. sekretario aranĝi dum Pasko konferencon en la federacia ĉefurbo, kies ĉefa celo estu pridiskuti la eblecon organizi la 10-an Tutaŭstralian E-Kongreson en Januaro 1956 en Canberra.

Jam la antaŭlaboroj por tiu "malgranda kongreso" montris ke niaj Canberraj s-anoj estas bonaj organizantoj. Spite de grava manko de loĝejoj dum la paskaj festotagoj, ili sukcesis lokigi ĉiujn en privataj domoj, kaj bone ellaborita konferenc-programo atingis ĝustatempe ĉiun partoprenanton.

Ges-roj H. Torr kaj la sekretario s-ano N. Gamble atendis je Sankta Vendredo (16/4) ĉiujn alveturintojn kaj kondukis ilin aŭtomobile al iliaj loĝejoj, kie ĉiuj ricevis belajn broŝurojn pri la federacia ĉefurbo. Denove per aŭtomobilo ni iris al la hejmo de ges-roj Torr, kiuj gastigis nin ĉe posttagmeza teo, dum kiu ni ankaŭ aŭskultis al Radiostacio 2CA, kiu disaŭdigis antaŭe registritan intervjuon kun s-ano Gamble kaj s-anino Torr pri Esperanto ĝenerale kaj pri la konferenco speciale. Samvespere okazis "Bonveniga Manĝo" en la "Blue Moon" kafejo en Civic Centre, post kiam ĉiuj veturis al la kunvenejo de la Canberra E-Klubo en la hejmo de la "Good Neighbour Council" ĉe Riverside, kie okazis la oficiala malfermo de la konferenco.

Partoprenis la malfermon, krom 9 membroj kaj amikoj de la Canberra E-Klubo, la sekvantaj vizitantoj: Ges-roj Matasin, s-ino Kluessendorf, s-ro Chandler, f-ino E. Dash kaj s-ro Currigan el Sydney, s-ano Herbert Koppel el Melburno, ges-roj Taylor el Albury, s-ano J. Davidson el Bathurst kaj s-ro Latimer el Nowra.

Ĉefa ero sur la programo estis diskuto pri la organizo de la 10-a Aŭstralia E-Kongreso dum Januaro 1956 en Canberra. S-ano Gamble raportis ke la loka klubo havas subtenon de la loka "Bon-Najbara Konsilantaro" (Good Neighbour Council). S-ro Downey, estrarano de tiu-ĉi organizo, ĉeestis kaj certigis ke lia organizo provizos al ni bonan kongresejon kaj subtenos aranĝon de granda Internacia Koncerto, laŭeble en "Albert Hall", la plej granda koncerthalo de Canberra.

Laŭ propono de s-ano H. Koppel oni elektis la jenan lokan kongres-komitaton: Prezidanto s-ano Ralph Harry (nuntempe aŭstralia ĉefkonsulo en Ĝenevo, kiu espereble revenos ĝustatempe), afergvidanta vicprezidanto (dum la foresto de s-ano Harry) s-ano H. Torr, sekretario s-ano N. Gamble.

Kiel privata donaco, s-ro Koppel transdonis al la Canberra E-Klubo "Oran Libron", verdlede binditan, en kiu oni registros la estontan historion de la klubo. S-ro Torr, nome de la klubo, esprimis dankon pro la donaco.

Dum paŭzo la ĉeestantoj povis vidi

la estontan kongresejon. Intertempe, s-ano Sandor Fulop aranĝis la librostandon kaj vendis sufiĉe grandan kvanton da E-libroj, dum ĉarmaj gastigantinoj regalis nin per bongusta manĝeto.

Je sabato, 17/4, samideanoj vizitis la Parlamenton, kie nia altranga samideano R.C. Loof atendis kaj salutis ilin. (Lia preskaŭ netradukebla ofico nomiĝas "Clerk Assistant of the Senate" and "Secretary of the Joint House Department.") S-ano Loof gvidis la vizitantojn tra la tuta bela domego kaj klarigis ĉiujn interesaĵojn, parte en Esperanto, parte en la angla lingvo. Samtage okazis ankaŭ vizitoj al la Nacia Biblioteko, la Nacia Universitato, la Instituto de Anatomio, la interesega Nacia Milit-Monumento kaj la nova monumento memore al la usonaj mortintoj de la lasta mondmilito. La Nacia Biblioteko honoris la konferencon per speciala elmontrado de sia bona kolekto de Esperanto - libroj. Ges-roj Gamble gastigis ĉiujn konferencanojn je posttagmeza teo. Samvespere ĉiuj vizitis kune filmteatron post kiam finiĝis interesplena tago per nokt-manĝeto en bela nederlanda kafejo.

Je Paska Dimanĉo (18/4) ĉiuj konferencanoj, en "karavano" de 5 aŭtomobiloj, ekskursis al la Cotter Rivero-Digo, revenante laŭ la "Uriarra Transpasejo". Survoje oni vidis (de ekstere) la Palacon de la Ĉefguberniestro. Vespere okazis "Distra Vespero". S-ro Matasin montris kolorajn lumbildojn (i.a. ankaŭ pri la Perta Kongreso), s-ro Koppel legis ŝercpoemojn de Raymond Schwartz kaj s-ro Fulop kaj f-ino Dash prezentis teatraĵeton. Agrabla surprizo je tiu-ĉi vespero estis vizito de s-ano David Miller el Perth, kiu hazarde estis en Canberra. Li tuj devis sidiĝi ĉe la piano kaj E-kantoj aŭdiĝis ĝis malfrua horo, kiam s-ro Torr faris finan paroladon, esprimante esperon ke ĉiuj revenos por la kongreso en 1956.

La loka gazeto "Canberra Times" kelkfoje raportis pri la konferenco, same ankaŭ la loka A.B.C. Radio-Stacio. La Aŭstralia Esperanto-Asocio dankas al la samideanoj en Canberra, kies lerta organizmaniero kaj bonaj rilatoj kun la oficialaj instancoj garantios belegan kongreson en Januaro 1956.

● **MELBOURNE:** La malvarma kaj malseka vetero dum la lastaj semajnoj ankaŭ influis niajn grupvesperojn. Tamen kelkaj entuziasmuloj ĉeestas regule la ĉiusemajnan klubvesperon. S-ro Burstin gvidas kurson por komencantoj post kiam okazas la kunveno de la progresintoj. Bonvena gasto estis (9/6) franca samideano Rene Asselin, kiu loĝas nun en Sydney, kaj kiu rakontis al ni pri siaj vojaĝoj tra Laplando kaj ĝia popolo. Dufoje s-ro Burstin prelegis pri dummilitaj aventuroj en Rusujo kaj pri postmilita rifuĝo trans la "Fela Kurteno" de Pollando, tra Ĉeĥoslovakujo al Germanujo. S-ro Koppel raportis (21/4) pri tre sukcesa Esperanto-konferenco en Canberra. Li ilustris sian raporton per landkartoj de Canberra kaj la "Ĉefurba Teritorio" kaj per belaj fotografaĵoj de nia federacia ĉefurbo. "Ĉeĥoslovakujo sub okupado de la Hitlera armeo" estis la temo de prelego de s-ino Fay Koppel (16/6), kiu ĉerpis sian materialon el leteroj de korespondanto, kiu kiel ĉeĥo estis persekutita de la Hitleranoj, sed spite de ĉiuj malhelpoj sukcesis fariĝi estro de filharmonia orkestro kaj Doktoro de Muziko de la konservatorio de Prago.

La programo de la monata "Rendevuo" estas ĉiam interesa kaj bone vizitata. En marto s-ro Davies rakontis al ni: Kiel kreskigi fruktarbojn laŭ la metodo de "espalier". En aprilo Doktoro Fred Williams prisklibis la uzon de "Esperanto en la servado de religio." Li kunportis kaj montris presaĵojn religiajn kaj klarigis ke la internacia lingvo estas uzata ne nur de protestantoj kaj katolikoj, sed ankaŭ de mahometanoj, budistoj kaj kvakeroj. Por la maja kunveno Doktoro A. Fridenbergs elektis la temon "Nenio", sed bona oratoro kiel li ne nur parolis tutan horon pri "Nenio", sed eĉ devis daŭrigi la filozofian prelegon dum ĉiusemajna grupvespero. Spite de grava aŭtomobil-akcidento, kiu preskaŭ mortigis lin, nia malnova pioniro Josef Gottlieb ne perdis sian ĉiaman bon-humoron kaj viglecon. Lia temo estis la rusa poeto Gorki, lia vivo kaj lia verko. S-ano Gottlieb, kiu parolas multajn lingvojn, tradukis historieton de Gorki en Esperanton kaj laŭtlegis ĝin. Ĝi temis pri "Markaro Ĉudra" aŭ la "Leĝo de la Dezerto"—socipolitika studo pri la vivo de rusaj ciganoj.

● PERTH: Okazis 28 Aprilo interamika vespero ĉe la Lig-sidejo, por bonvenigi novajn studantojn. Interesoriĉa prelego de s-ro N. Brodie ĉie klubkunveno 8 Aprilo: Okuloj, kiuj Vidas. La parolanto ĉe la Junia kunveno estis s-ro A. Saar. Lia prelego: La Alfabeto.

Tri aferoj tre ĝojigas nin. La ĉefa estas la starigo de E-kurso fare de la Fako por Plenaĝula Edukado (Adult Education Board) de la universitato de Okt. Aŭst. La kurso konsistas nur el dek lecionoj sed la sperta gvidado de nia eminenta sam-o D-rino Summers sendube rikoltos el tiu mallonga kursdaŭro la plejeble efikan rezulton.

Ankaŭ, ni tre ĝojas pri tio, ke varma subtenanto de nia afero, s-ino Ruby Hutchinson, elektiĝis al la Okc.-Aŭstralia Senato (Legislative Council). S-ino Hutchinson iam partoprenis al E-kurso sub gvido de s-ro Burt. Poste ŝi studis en klaso de nia Ligo. Samtempe ŝi estas unu el la fondintoj de la "Amikoj de E-o" movado en Perth. Por tiu movado ŝi multege laboris ĝis venis tempo, kiam ŝi sentis, ke ŝi devas dediĉi sian tutan energion al politika agado. Kvankam ŝi ne aktive partoprenis al Ligaj aferoj jam dum kelke da jaroj, ŝia intereso pri la movado ankoraŭ restas kaj estis ŝi kiu persvadis al s-ro J. T. Tonkin, tiam Ministro por Edukado, malfermi la kongreson de AEA en Jan-o ĉijare. Parenteze, s-ino Hutchinson estas la unua virino, kiu ĝis nun elektiĝis al la Okc.-Aŭstralia Senato, aŭ ŝtata Supera Ĉambro.

Plezura okazo por nia Ligo estis ricevo de librodonaco konsiste el proks. 30 E-libroj. Ilin donacis f-ino McDonald, kies patro, s-ro Andrew McDonald, estis fervora E-isto. Inter la libroj estasLa Biblio, verkoj de Kalocsay, Kabe kaj Privat, kaj tradukoj de verkoj de Shakespeare. Ĉiuj libroj aldoniĝis al nia biblioteko. La ĉi-tiea gazetaro raportis la donacon.

Denove ni kun bedaŭro raportas malsanon de klubano nia—s-ino G. Pollard, nia bibliotekisto kaj gvidanto de la kurso por progresintoj. Ŝi pasigis kelkan tempon en kuracejo sed feliĉe jam estas hejme. Dum ŝia resaniĝo nia nelaciĝebla f-ino Longson entreprenis aldoni al sia nuna ŝarĝo la respondecon gvidi la nomitan kurson.—Ruth McGrath.

p. 60: Pro nesufiĉe atenta kungluo de du apartaj raportoj el Perth, ni donis impreson ke F-ino Bull deziris sukceson al si!. Ni petas pardonon de tiu modesta amikino.

---

● CANBERRA: La kasisto, s-ino Torr, aranĝis matenan klason por virinoj, kiuj ne povas ĉeesti la kutimajn vesperajn klasojn.

Ĉe la monata kunveno oni ludis ludon aranĝitan de s-ino Torr. Kelkaj infanrimoj estis priskribitaj, kvazaŭ ili estas ĉeflinioj en taggazeto, kaj tradukitaj en E-on. La ĉeestantoj devis diveni la nomojn de la rimoj: ekzemple, "Stranga Dorlotbesto—Kurioza Konduto"—signifis "Mary Had a Little Lamb."

Estis decidite, ŝanĝi la kunvenvesperojn de lundo al vendredo, por ke 5 anoj de Queanbeyan, 5 mejlojn for, povu ĉeesti. Tiu ĉi klaso estos ĉe la hejmo de ge-sroj Torr, sed la monatkunveno daŭros okazi ĉe la "Good Neighbor Council".

Por progresintoj s-ro Fulop aranĝis korespondkurson dum la vintraj monatoj, ĉar estas malfacile aranĝi kunvenojn por dua klaso. La sek-io, s-ro Gamble, parolis al la loka "Y.M.C.A." (asocio de kristanaj junviroj 7 Junio pri E-o.—Harry Torr.

---

## "LYRICS FROM LOVELAND"

**Jack Eliot, 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W.**

A writer in "News of the World" (London) remarked that "Love is a word we have to be careful about; in certain contexts it has a sex significance". Our old Esperanto friend shows unwillingness to "love" his object in any other terms than those that preclude the dire eventualities that beset the sweet commerce as practised by ordinary mortals. He equates it with wistful (if not wishful) dreaming, a vague Traumerei enclosed staidly by the limits of "eyes, smiles and hand-holding": "Kiss not with lips, but understanding smile," ascetic advice for most; maybe angels hold tender converse so.

For him "love", that chameleonic entity, is "not to be handled amiss, but trustworthily construed." Nothing subtle about that.

"Fragrant and lissom, a breath of Springtime," Mavys is the latest chimera on our friend's emotional assembly line. This feminine phantasm is for him "just a glimpse of Heaven." This phrase is not to be subject to an unduly strict theological interpretation.

Lines representing criticism of Christian creed and conduct are weak vinegar, and could offend few. A godly clerk "saying grace" over his chop, and a sated tiger licking his chops, are compared, favorably to the latter. Temples and tom-toms, altars and atom-bombs, are placed in close relation, with obvious implication.

This little body of verse, while inferior to earlier ones, may be acceptable to persons observant of the workings of sentimental amorism in those with the gift of psychic self-expression in later life cycles. These movements are expressed in a naive, dreamland, nostalgic symbolism that draw their impetus more from the spirit than the flesh.

J.E.'s work in Esperanto is better than that in English. Copies from the author.—F.R.B.

### DE LA PREZIDANTO.

Ĉu la Perta kongreso sukcesis? Pri tio povas resti nenia dubo.

Pro la longa distanco de la cetera Aŭstralio, eĉ kelkaj Pertanoj eble sentis iom da dubo, kiam ni unue proponis la ĉefurbon de la okcidenta ŝtato kiel sidejon por la Naŭa Aŭstralia Esperanta Kongreso, sed tiaj timoj pruviĝis tute senbazaj, ĉar la kolektiĝo de la pacaj batalantoj ĉe la bordo de la belega Swanrivero estis eksterdube unu el la plej elstaraj manifestiĝoj de la movado en ĉi tiu lando, dank'al la nebridebla kuraĝo, vigla entuziasmo, senĉesa laboro, kaj bona organizo de la lokaj samideanoj, sed, super ĉio, pro ilia ega emo al la gastamo.

Ĉiuj partoprenintoj tre konvinke atestas ĉi tiun fakton, sed kiam la kasisto, F-ino Longson, sendis kvardek pundojn por la lamanta kaso de A.E.A., ni ricevis tian konkretan pruvon, kian neniu povas argumenti.

Ni gratulu denove niajn Pertajn samideanojn, esperante, ke la verduloj ĉe Kanbero, la elektita loko por la Deka, egale sukcesos.—Via prezidanto, Ken G. Linton.

# Tra La Mondo

URUGUAY: Radio-station CX26 (Dept. of Agric.) has 15-minute regular program on Esperanto. First Tuesday of each month.

SWEDEN: Royal Library of Stockholm has Esperanto section and appeals for books through the world. It has every Esperanto book published in Sweden. Gothenburg to have an Esperanto-Square.

CHINA: Second edition of 936-page Chinese Esperanto dictionary.

BRAZIL: State College of Parana has Esperanto classes.

CZECHOSLOVAKIA: Clubs functioning well. That at Brno shows very high cultural level. Esp-o is now State-controlled, but has right to act publicly, arrange courses and district meetings. It is helped monetarily and morally by the Trade Unions and the Education Council. ("Sennaciulo," March.)

FINLAND: Esp-o in eight schools. 150 E-ists at Easter congress in Helsinki. E.A.F. to join U.E.A. as member-assocn.

GERMANY: Dr. S. Ziegler has been officially appointed Esp. interpreter in Muenchen.

NORWAY: N.E.L. has nearly 1000 members. 668 notes on Esp-o in 124 papers.

JUGOSLAVIA: Esp. section in Zagreb Uni. Library. Send books, &c., to Sveuĉiliŝna Biblioteka, Zagreb.

ITALY: Esperanto World Congress in 1955 at Bologna.

HOLLAND: More than 2000 applications for the Haarlem World Congress of Esperanto. Acceptance was suspended through lack of accommodation.

### NEKROLOGO.

Kun bedaŭro ni raportas la morton de S-ino Shuttleworth, en Shenton Park (Okc. Aŭst.). Ŝi malavare subtenadis nian movadon en Perth kaj antaŭe en Southport (Anglujo). Ni sincere kondolas kun nia membro S-ino B. Jones, fratino de la mortinto.

Mi estas 26-jara komencanto de E. kaj filatelio, docento de germana lingvo. Dez. k-ori. Y. Araki, Kwansei Gakuin Universitato, Nishinomiya, Hyogo, Japan.

The author warns against using -iĝ instead of an obviously called for passive participle. Zamenhof never so used -iĝ, but the practice is widespread. "Ĝi troviĝas en la vortaro" is better rendered "Ĝi estas trovebla en la . . ." or "Oni trovas ĝin en la . . ."

The remarks on word order do not cover the matter of euphonious two-word arrangements such as "apogo morala", which evades the clash of a's in "morala apogo".

Mr. Stuttard lightens his purely pedagogic text with several interesting observations. He says, "For some unknown reason early E-ists used capital letters for months of the year, but small ones for days of the week . . . . The general trend internationally is to small letters, but choice is optional."

"-uj with trees has become archaic. No longer 'pirujo' but 'pirarbo'." "The free and correct use of the adverbial participle stamps the expert." "The student should make it impossible for him to be misunderstood," an echo of Quintillian: "By perspicuity care is taken, not that the reader may understand if he will, but that he must understand, whether he will or not." "Students who wish to acquire a good style may with profit read the Congress speeches of Zamenhof." Could there be better advice?

85: "Gallup poll," opini-kontrolo." This form, while sound, is uncomfortably evocative of that "thought control," suppression of free opinion, familiar to police States.

One press error: Schiller's "Robber"(s).—F.R.B.

## UNU-DU LEGANTOJ

plendetis (ne en Libera Forumo), ke ni iufoje citis el "Heroldo de E.", kio kaŭzis por ili la neagrablajon legi dufoje la koncernan tekston. Ni rimarkus, ke ilia sinteno estas iom tre individueca; la efektivaj abonantoj aŭ ricevantoj de "H. de E." en Aŭstralio estas malmultaj (certe malpli ol dek). Ricevas La Rondon pli ol cento da homoj, kiuj neniam vidas "Heroldon de E."

VIVISEKCIO: "Mi tiel malamas la vivisekcion, ke nur kun tre modera plezuro mi rigardus vivisekciiston distrancata."—Mark Twain.

## SUBSCRIPTIONS RECEIVED.

Mesd. Hartman, Wishart, Baesjou, Morrison (Sale), Foster, 12/6. Misses Newnham, Dash, A. Godfrey, E. Godfrey, Cox, E. Styles, E. M. Styles, Curtis, 12/6. Messrs. Oki, Waseda, H. V. Cohen, Porter, Illingworth, Belcher, Ramsey, N. Grant, Cowley, Hirschel, Schwerin, Dwyer, Parrish, Munnerley, Bennett, Holmes, Costa, Gottlieb, V. Smith, Thompson, Rees Perry, Glier, Ballard, Rev. C. Cowling, Suess, Boyle, Joab Eljot, Walker, 12/6; Fekonja, 25/- (2 years), Ottens, 6/3; Davidson, 12/6. Canberra E-Club, £4/7/6 (7 members: Messrs. Torr, Gamble, Harry, Fulop, Downey; Mesd. Hall, Cottingham). W.A. E-League, £5/0/6, £4/8/-, £1/5/6 (Second List of 17 members (Mesd. McGrath, Strassberg, Pianta, Daniels, Hitch, Fidock, Hill, Jones, Einihovici, Misses Woolley, Dr. Summers, Angwin, Leach; Messrs. Hicks, Cettini, Dr. Einihovici, Strassberg). Sales, Rondo, 9/-; Miss I. Reed (Brisbane), 12/6.

**Special Thanks**

to our supporters: Mrs. Wyres (Ballarat), 20/-; Miss I. James (Melb.), 20/-; Mr. F. Smith, 20/-; Mr. Saar (Perth), 19/-; Mr. J. Matasin (Sydney), 20/-; Mr. E. Hearne (Melb.), 20/-; Mr. H. W. Fidge (Adelaide), 20/-; Mr. Latimer (Nowra), 20/-; Frank Halls (Bacchus Marsh), 20/-; Western Australian Esperanto League £40 (profit 9th Australian Esperanto Congress, see also reference in "Prezidanta Letero").

## HOMO DE TRI JARCENTOJ.

Felice Marcantonio, frato de la fondinto de L'Osservatore Romano (1861) estis rimarkinda homo en almenaŭ unu afero: li havis la ekstreme maloftan sukceson vivi en tri jarcentoj. Li naskiĝis en 1799 kaj mortis en 1902. (G. Gremigni, "Il Santo Padre Pius XII"). Ĉu legantoj povas citi alian tiel strange vivintan?

Tiu statuo de virino estas perfekta.
Al ĝi nur mankas paroli.
Tial, mi diras, ke ĝi estas perfekta.

Jen granda sekreto por konservi la sanon: manĝi krudajn bulbojn!

Tre interese; sed rimarku, ke tio estas tre malfacila por konservi la sekreton.

# Recenzoj

**"PASKO: LA MONDSAVANTO KAJ LA HOMARO.** El la dana trad. C. Graversen. Verko de Martinus. La Spirit-scienca instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Copenhagen. 80p. Skribu al la adreso.

La homaro estas, jam de la kosmokomenco, destinita al universala savo, per serio da mondosavantoj, el kiuj la plej granda estas la Kristo. Ke ankaŭ "mondsavantoj" estis la kruelegaj konstruigintoj de la piramidoj kaj sfinksoj, ĉe kies prilaboro mortis miloj, impresas nin strange. Certe necesus la "okulo de okulte evoluinta estulo", por vidi, ke tiuj masonitaj masoj "brulas kun la ne miskomprenebla klaro de la sankta spirito."

La savo estas ne el peko, sed el malscio, bruteco. La vojo al savo: etike kaj morale imiti kaj sekvi la savantojn. La konscia vivo kaj personeco neniam ĉesiĝas; la homoj iras post "morto" en transmondajn sferojn por poste reveni teron, perfektigite.

La Krista releviĝo: "Lia tombo ne estis jam tombo, sed suno, blindiga lumego, pordo de la ĉielo, malfermita por lasi la senditon de Dio en la fizikan mondon. Maria vidis lian spiritan korpon en la ĝardeno; li avertis ŝin 'Ne tuŝu min', ĉar pro la jusa okazo en la tombo, la korpo vibris tiel forte, ke al terulo estus morte danĝere tuŝi ĝin". Tamen tio ŝajne moderiĝis, ĉar poste, en la Supra Ĉambro, "li prenis por la lasta fojo en la fizika sfero ĉiun unuopan disĉiplon al sia brusto". Luko 24.

La doktrino de Martinus ŝajnas i.a. havi tuŝpunktojn kun Teozofio kaj Svedenborgianismo, kaj aparte interesus homojn inklinajn al tiuj pensosistemoj.

p. 19: "homaro ne povas peki"; sed 57: "pekemaj homoj". Tio ne estas klara lingvo. 10: se ili devis havi . . . fariĝi. (Por ke ili havu . . . fariĝu.) "la popoloj vivis de plurajn jarcentojn"; forigu "de".—F.R.B.

---

SENNACIECA REVUO, tria kajero (82m), 1954. 5/6 ĉe niaj agentoj. Plaĉos al pensemaj homoj ĝiaj 56 paĝoj da diverskultura legaĵo, pipritа per ridiga verketo de Schwarz kaj vivigita per plumportreto de Hodler, fare de Privat. Ankaŭ valoriĝas la kompilon ĝue longa artikolo pri Aŭstralio, de M. Leereveld. La asertoj de nia observema amiko devus instigi interesitojn komenti en nia rubriko Libera Forumo. La kajeron mendu; la kritikojn sendu!

---

**"La Junaj Detektivoj"**, de J. H. Sullivan; eld. Esp. Pub. Co. 43 pĝ., 2/9 ĉe niaj agentoj. Porjunula rakonto en tre bona lingvo. Simpla sed interesa. Bedaŭrinde mankas "surprizĝinaĵo", kio estas tiom pli rimarkinda, ĉar la aŭtoro obsede uzas la vorton "surprizo". P. 16: "La onklino saltetis kvazaŭ en surprizo". Kial ne, "saltetis pro surprizo", ĉar sendube ŝi surpriziĝis. 39 (dufoje): "je la surprizo de . . . ." (je la miro de . .); 23: Ĝenas pleonasma "kiam" ĉe kelkaj frazoj, ekz-e 23, 30, 33, 36, "ĝis kiam io okazis" kaj aliaj; komparu: 29: "ĝis la knabo vidis . . . ."; 32: "ĝis vi estos . ." (laŭ Zamenhofa uzo). 42: "Mi povas imagi tion" (Anglismo: I can imagine that; senco estas, "Komprenеble!"). Aĉetu ĝin tuj por via juna E-amiko.

LA ARTO FARIĜI CENTJARA, de Ludwig Wegener, 60 p. Eld. Presejo Limburger, Limburg/Lahn, Germany.

Populare verkita sistemo de sana vivado. Ĝi celas precipe instrui al junaj homoj la arton generi mense, korpe fortikajn infanojn, sed ankaŭ al maljuniĝantoj la sekreton de tremaljuneco. En nia komplika kaj komerceca socio, la reguloj donitaj sendube postulas paciencon kaj celatingemon, ĉar la jam preparitaj kaj "antaŭdigestitaj" manĝaĵoj en belaj paketaĵoj respondas al la bezono ŝpari tempon en nia tro dense aferplena ĉiutago, tamen seriozaj legantoj, ŝatantaj la sanon, eltiros el la verko multon tre frapan—kaj avertan. "Blanka sukero forprenas kalkon de la korpo, do malutilas dentojn kaj ostojn". "Diabeto precipe ekestas per multa manĝado sen malsato". Nenio estas ignorata: nutro, dormo, spiro, banado, tabako, alkoholo, ĉiu ricevas siajn komentojn. (4/9 de AEA, Box 2122T, Melbourne.)

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARGENPLANTOJ, de Paul Neergaard, eld. The Esperanto Publishing Co. 234 p. Prezo 25ŝ., afranko 1ŝ.

Mirinde riĉa, sur artpapero, ĉi luksa eldono estas eĉ pli detala ol la Dana. Kun utila terminaro hortikultura. Ĉiu plantamanto devas ĝin havi. La kosto estas modera; la valoro netakseble alta.

**ŜLOSILO POR PERFEKTIGA LERNLIBRO, "POST LA KURSO."** 56p. gm. 1.20. Kompletigo de la verko pli frue recenzita. Simile al ĉiu farita de la sinjoroj Wingen, ĝi estas perfekta ekzemplo de la pedagogia kaj teknika prezento. Valora kompendio de la lingvo, ĝi bone servas ne nur al Germanoj sed ankaŭ al ĉiu penanta lerni tiun lingvon pere de la internacia lingvo Esperanto.

(Ankaŭ el la supra eldonejo.)

**DAS PROBLEM DER INTERNATIONALEN SPRACHE..** 20 paĝoj, 2 resp. kup. ĉe Buchverlag der Verbandsdruckerei AG, Berne, Svisujo.

D-ro Arthur Baur, parolisto de la Svisa Kurtonda Radio, klare, sobre, konvinke traktas la demandon en formo tre taŭga por uzo ĝenerala. La historio de I.L., la evoluo de E. ĝis la nuntempo, la pretendoj de E., estas trafe resumitaj, Niaj germanlingvaj amikoj inter ni devus traduki tiun modelan verketon kaj diskonigi ĝin prelege antaŭ siaj klubanoj. Ĝi estas la respondo al la sopiro de ĉiu, kiu serĉas interesan kaj facile sorbeblan paroladon ĉe amikokunvenoj.

**"Faktoj pri Norvegujo."** — En 64-paĝa fotoriĉa, la bonega teksto donas kompletan rigardon sur ĉiun fakton de la nacia vivo. La plej granda jurnalo "Aftenposten", eldonejo Schibsteds, la Norvega E-Ligo kun registara subvencio eldonis ĝin. 3.ŝ. ĉe Box 942, Oslo.

## NI RIDU!

El recenzo: "Ĉi tiu romano estas tradukita en 15 diversaj lingvoj".

(Kiam fine aperos romano tradukita en 15 SAMAJ lingvoj?)

El romano: "Kun tia nulo mi ne plu povas labori!"

(Do serĉu **alian** nulon!)

El alia romano: "Mi ne estas tia aĉulo, kia vi verŝajne supozas min."

(Do kia aĉulo vi fakte estas?)—La trio el "La Progresanto".

## LA PIONIROJ

**de Brendon Clark. Ĝi gajnis la duan lokon ĉe la Konkurso-Masel.**

Kun nova espero kaj koro kuraĝa,
Sur grundo silenta en lando sovaĝa,
La noveveninto de ie trans maro
Forhakis vivspacon en densa arbaro.
Muskola ĉe brako, fortika ĉe kruro,
Li plantis la semojn de fina sekuro,
Kaj en la dometo el krudaj tabuloj
Li loĝis feliĉe kun geaj karuloj.
Najbarojn li tamen malofte vidadis,
Ĉar, kvankam aliaj la landon invadis,
Distancoj tro grandaj dislokis la domojn,
Kaj nur ŝamceleco kunligis la homojn.
Per memfidaj manoj kaj daŭra kontrolo,
Per vigla pensado kaj verva privolo,
Li gajnis sufiĉe por junfamilio,
Kaj pri la cetero li fidis al Dio.
Do, kiam somere la fajro alzumis,
Kaj semojn kaj herbon kaj bestojn konsumis,
Kaj kiam en vintro torenta diluvo
Inundis la teron sub pezo de pluvo,
Neniam li paŭzis, neniam priploris,
Sed de la komenco denove laboris.
Kaj nekonatuloj salutis amike,
Kaj haltis por helpi, sindone, efike . .
Grandegaj civitoj la homojn nuligas:
Izola kunago korvarmon instigas.

Jen, eĉ en soleco troviĝas kontento:
Se multaj la homoj, malmulta la sento.
Do ĝoju vi nun, kiuj nun pioniras:
Realon ne perdu dum revoj vin tiras.

## EN SUDA SUDANO.

Mi naskiĝis en Suda Sudano, tial mi estas Sudsudanano. Ĉe mi ferie restas Suddano, homo naske el Suda Danujo. Ni do estas suddana kaj sudsudana samideanoj! Kompreneble, se mia vizitanto estus, ekz-e, Franco ordinare loĝanta en Suda Danujo, li estus Suddanujano.

(Ideo el "H. de E.")

## LIBERA FORUMO.

In the past forty years I have received and read many Esperanto papers from various countries. In my opinion La Rondo is the most informative and helpful.—(Mrs.) C. E. Stope, Victoria.

CITIZEN PRINTERS, CAMBERWELL

# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

**Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.**

**Jarkotizo: 12½ŝ (aŭ 20 respondkuponoj).**

**Anoncoj: Tri linioj: 4ŝ.**

**Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.**
**Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.**
**Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.**

Vol. 11, N-ro 63. **MELBURNO.** **Julio - Sept., 1954.**

# Let's Talk About Esperanto

**A Conversational Conspectus for the "Outsider".**

### Origins of the Language in Australia.

In February, 1905, John Booth, an engineer and a member of the University Council, with eleven others, founded in Rathdown Street, Carlton, the first Esperanto organisation in this country. Booth, after a life of ceaseless activity for the international language movement, died in 1920, as recorded in "La Suda Kruco," of which a file is kept in the Melbourne Public Library. The movement spread to all States. Nine congresses have been held in the capitals since 1911, in which year Adelaide was the venue. Esperantists from all over Australia will meet at Canberra for the Tenth national rally, in January, 1955.

### Cultural Activities.

The Melbourne Esperanto Club, 18 George Parade, Melbourne, is the centre for Victoria. It runs classes and social evenings on Wednesdays, and The Rendevuo for speaking Esperantists on the last Friday in each month. This group gives talks in Esperanto, with following discussion on such subjects as: My Experiences as a D.P.; Early Esperanto Life in Melbourne; Service Adventures in New Guinea; The Secret Life of Earth Worms; The Evolution of Words—Semantics; Life and Work of Goethe; Tito; Man, the Individual and the Mass; The Berwick School of Languages for Missionaries. As a medium for the spoken language The Rendevuo is of great value. Similar activity is manifest in Sydney and other States, and we hope to detail these later.

### Reciprocal Help.

Large-scale immigration has brought to Australia many European Esperantists. Some of them were first interested in Australia through their Esperanto correspondents here. In the Netherlands a special service was established by the Esperantist movement for intending migrants to Australia. On arrival here they have been made to feel at home and their assimilation has been helped by the Esperanto clubs, which have proved an oasis in the desert, in that they have been enabled to speak freely in the international tongue while learning English. Esperantists have helped them to fill forms and find employment, &c. The Esperanto "consul" at Albury has maintained regular contact with the Bonegilla Migrant Centre. The New Australian Esperantists, for their part, have increased the number of active adepts in this country, and by their knowledge and diversity of background have raised the level of expertness among those who had previously learned the language chiefly from books. The names of these fine

auxiliaries stud the membership records of the Australian Esperanto Association, which is affiliated with the Universal Esperanto Assn. abroad.

**Publicity Abroad.**

Several Victorians have visited World Congresses of Esperanto in Europe; many more have contributed articles and literary work to the world Esperanto press. Dorothea McKellar's My Country appeared in a Swedish paper, in Esperanto translation; translated articles by the Hon. W. S. Kent-Hughes on Canberra, and on the Colombo Plan by the Hon. R. G. Casey, appeared in the Geneva central Esperanto organ, "Esperanto"; a booklet in Esperanto on the Tasmanian aboriginals by Rev. C. C. Cowling was given world currency; similarly an original Esperanto narrative on Service life in New Guinea from the ethnologist's angle by Mr. K. Linton is to be published in England, to name a few.

Esperanto has been useful in assembling material for exhibitions drawn from foreign countries. In Sydney (1951) an exhibition of child art was held in the Town Hall, the largest of its kind. Mr. W. Chandler, a teacher, gathered 8000 exhibits by Esperanto correspondence throughout the world. His "International School Families" regularly exchange their work and gazettes with each other over the globe. Esperanto was the intermediary language for the use of Australian-theme projects for textbooks in French schools. General correspondence by Esperantists with foreign countries is widespread, and solid work is done. In Japan, especially, resumes of scientific works are to be found in Esperanto.

**In Schools.**

In Victoria, Mr. R. Rawson, M.L.C., for many years as secretary for the Melb. E. Club, conducted lessons in Esperanto by radio. In 1931 he founded the Pyke Memorial Examination in memory of a loved pioneer. A money prize is given for the best student not having studied the language for more than a year. Certificates of competency are also awarded. Classes for children have been held in Perth (Presbyterian Ladies' College); Adelaide (Woodlands C. of E. Girls' Grammar School; two classes in Woodville Primary); Sydney (Chatswood Public School); Canberra Boys' Grammar School. Examinations in Australia are to the standards of the British Esperanto Asscn.

**Esperantists Abroad.**

Esperantist Australians have made extensive lecture tours in Europe and elsewhere. Percy Hudson girdled the earth three times, using Esperanto in non-English-speaking lands and addressing universities and other groups. Mr. F. Halls made an 11-months' trip, visiting 20 countries by means of the Yearbook of the Universal Esperanto Asscn., which contains some 2000 addresses of those pledged and ready to help him. At the world congress at Oslo he found 1600 representatives from 35 lands able to speak freely to each other, conscious of no racial or language barrier.

Interested in children's courts, he consulted centres in Marseilles, Carinthia, Zagreb, Trogen (Switzerland), Cologne, Munich, Stuttgart, Oslo, Stockholm, Barcelona, Rome, Belgrade and many other cities, finding none of the difficulty the non-Esperantist faces on similar tours of study. When using English with foreigners he found it necessary to use simple words and to avoid complex forms. There was much scope for misunderstanding, even so. English is not, he says, as widely or as well used in Europe as is generally believed, and in seeking interpreters he invariably employed local Espernaitsts, who readily volunteered their services.

**Esperanto Word-stock.**

Esperanto is compounded primarily of roots from Latin or its derived languages; that is, from the Romanic group; secondarily from Teutonic, and lastly (very sparsely) from Slav sources. It is estimated that a Frenchman recognises 87% of its roots; an Englishman 70%; a German 68%, a Russian 40%. There are no Oriental roots other than those having currency in European tongues, such as sheik, turban, kimono, bonze, samovar. An ingenious use of some 30 affixes enables an infinite number of words to be compounded on a principle similar to that in Greek and German. With half an hour a day of conscientious study one should write and read simple matter after three

months, and make one's wants known by word of mouth. After a year of continued application one should be able to read a novel or narrative and write with clarity and correctness.

Of course, much depends on native intelligence, persistence and "feeling" for language on the part of the learner. He who lets his mind dwell on the subject outside the formal half-hour of daily study, and who gives up some of his reading time from gun-belts and brassieres, neutrons and car-engines, and devotes it to Esperanto papers and books, will make quicker progress.—F.R.B.

---

## LA 39-a UNIVERSALA KONGRESO.

La aŭstralia E-movado estis ĉijare en Harlemo (Nederlando) reprezentata de 2 homoj. S-ano Ralph Harry (Canberra), kiu nuntempe estas aŭstralia ĉef - konsulo en Svislando salutis por la aŭstralia registaro kaj Kevin Smith (Sydney) por A.E.A. Ambaŭ samideanoj sendis al ni aerpoŝtajn raportojn, sed pro spacomanko ni nur povas publikigi tiun de s-ano Ralph Harry:

Dimanĉe, la 1-an de Augusto, malfermiĝis la plej granda E-Kongreso dum la lastaj 30 jaroj, kiam 2,300 E-istoj el 28 landoj plenplenigis la "Krelagehuis" de Haarlem, Nederlando.

Salutis la Kongreson la Ministro-Prezidanto de Nederlando, S-ro D-ro W. Drees, kiu parolis dum 10 minutoj Esperante pri la bezono de Internacia Lingvo kaj la vidpunkto de la nederlanda registaro. Li diris ke Esperanto jam multe faris por interkomprenigi la popolojn, kio estis la celo de la fondinto de la lingvo D-ro Zamenhof.

Ankaŭ bonvenigis la kongresanojn la urbestro de Haarlem, S-ro Mag. Cremera. La konsilantaro de la urbo donacis milojn da ruĝaj diantoj, kiuj beligis la halon kaj la "buton-truojn" de la ĉeestantoj. (Merkredon (4/8) la urbestro invitis la eksterlandajn kongresanojn al vespera akcepto en la urbdomo).

Reprezentantoj de 10 registaroj tiam salutis la kongreson. Unue estis la aŭstralia ĉefkonsulo en Svislando, kiu komunikis Esperanto la bondezirojn de la ĉefministro de Aŭstralio. S-ano Harry diris: "Mi estas rajtigita de la ĉefministro de Aŭstralio transdoni la bondezirojn de la Registaro de la Federacio de Aŭstralio al la 39-a U.K. de Esperanto. La ĉefministro fervore esperas ke la kongreso vidos pluan progreson en la direkto al la forigo de lingvaj bariloj inter la diversaj landoj de la mondo. Mi mem, kiel reprezentanto de mia registaro ĉeestas ĉirkaŭ 20 internaciajn kongresojn ĉiujare. Tiu kongresoj estas t.n. "naturaj" kongresoj, kie oni parolas la "naturajn lingvojn". Nature ĉiu partoprenanto devas porti telefonajn aŭskultilojn, kelkfoje ankaŭ porteblan radioaparaton. Nature estas tuta stabo da interpretistoj. Nature estas tuta armeo da tradukistoj en la oficejoj, naskigantaj la multobligitajn paperajn monstrojn, kiuj ensvarmas la internacian pejzaĝon. La natura kosto estas kolosa, la natura konveneco estas malgrandega. Tial estas interese ĉeesti la unuan fojon internacian kongreson kie **malnature** la oreloj **estas nudaj,** neornamitaj, kie oni **serĉas vane interpretistojn** aŭ **tradukistojn,** kie ĉio estas simpla, **malmultekosta,** efika kaj kie ĉiu **kongresano estas egala,** kaj egale transpenetras **la lingvan barilon.** Do, estas granda plezuro **saluti la 39-an** Univ. Kongreson."

Sekvis prelego de Prof. Ed. Privat de la Universitato de Neuchatel, kiu oratoris pri la pioniroj, la nunaj taskoj de la movado kaj la estonteco. Li avertis kontraŭ tro da espero pri la subteno de registaroj, al kiuj estas la homamasoj kiuj gravas. Tial, kvankam UNESCO povus helpi la aferon, laŭ Profesoro Privat, ni ne devas tro atendi je la Kongreso en Montevideo. Tiam la 20 landaj Asocioj mallonge salutis. S-ano Kevin Smith (Sydney) transdonis la bondezirojn kaj promesis la daŭran subtenon de la Aŭstralia E-Asocio. Fine, post elokventa prelego de D-ro Lapenna, la tuta ĉeestantaro leviĝis por komune kanti la Zamenhofan himnon, "La Espero".

Dum la semajno kiu sekvis okazis kunvenoj de UEA kaj de fakaj asocioj. La prelegoj de Somera Universitato ankaŭ allogis multnombrajn aŭskultantojn. Mardon (2/8) ĉeestis la kongreson kiel oficiala observanto, S-ro F. T. Homer, Sekretario en la Aŭstralia Ambasadorejo en Hago. Kun S-ro Harry li observis prelegojn de Prof. D-ro C. C. Berg de la Uni-

versitato de Leiden (pri "Kial la popoloj estas diversaj") kaj de D-ro W. P. Roelofs (pri "La mono, unu el la fundamentaj homaj kreaĵoj.") Li ankaŭ pasigis kelkajn minutojn ĉe la Ĝeneralaj Kunvenoj de KELI kaj ILEI kaj vidis la viglan aktivecon en la enirejo kun ĝiaj giĉetoj kaj tabuloj, en la librovendejo kaj la restoracio, sur la strato kaj sur la trotuaroj.

Jaŭdon (5/8) okazis la ĉefaj ekskursoj al Hago por viziti la Pacpalacon, sidejon de la Internacia Kortumo de Justeco. Vendredon (6/8) la ĝenerala kunveno de UEA ricevis la raportojn de fakaj kunvenoj. Sabaton okazis la solena fermo kaj oni anoncis la rezultojn de la debatkonkurso kaj de la Belartaj Konkursoj kaj la kongresprezidanto s-ro Kennedy donis sian ferman paroladon. Kaj de multaj buŝoj oni audis la vortojn "Ĝis Revido venontjare en Bologna."

### "THAT THEIR EYES MAY BE OPENED."

My father was an eye-specialist. Every day for many years he would tirelessly bend over eyes attacked by disease, eyes covered with a film of blindness. But when his hours of consultation were ended—when night enfolded the earth and closed for sleep all eyes, seeing and unseeing—another kind of work began in the small study in Dzika Street. There the healer labored and fought without respite, to the end that the blind eyes of humanity itself might be opened, and that those with sight, often more blind than the sightless, might find in themselves that inner spiritual vision by which one recognises in the face of one's fellow man the face of a brother.

Mia patro estis okulkuracisto. Ĉiutage dum multaj jaroj li senlace kliniĝadis super okuloj atakitaj de malsano, okuloj kovritaj de vualo de blindeco. Sed kiam finiĝis la horoj de konsultado—kiam la nokto envolvis la teron kaj fermis por dormo ĉiujn okulojn, vidantajn kaj blindajn—komenciĝis alia laboro en la malgranda kabineto ĉe la strato Dzika. Tie la resanigisto senhalte laboris kaj batalis, por ke malfermiĝu la blindaj okuloj de la homaro mem—por ke la vidantoj, ofte pli blindaj ol la blinduloj, trovu en si tiun internan, spiritan vidon, per kiu oni rekonas en la trajtoj de ĉiu homo la vizaĝon de frato.—Lidja Zamenhof.

# Australia Kroniko

**BRISBANE:** Ĉiumonataj konversacivesperoj okazas en la hejmoj de la anoj laŭvice. Paroladoj, diskutoj kaj babilo vivigas la horojn kaj post manĝeto la grupo kutime disiĝas ĉirkaŭ la dekunua p.t.m.

Precipe ĝuindaj estas klarigaj kaj pensigaj prelegetoj de nia tre sperta s-ano A. d'Oliveyra. Ili kaj plaĉas kaj instruas al la partoprenantoj.

28 Julio vizitis Brisbanon Angla s-ano W. L. Simpkins, kiu neurĝe vojaĝas tra la mondo. Post vizito al Svedujo, Hindujo, Svisujo, li pasigis 5 monatojn en Japanujo. Dum sia restado tie, S-ro Simpkins faris kelkajn paroladojn pri kaj en Esp-o, kaj laŭ peto de Japana profesoro de la Angla lingvo li prelegis en universitato.

S-ro E. G. Littleton aranĝis radiointervjuon ĉe Nacia Stacio 4QR, kiu dufoje dissendis ĝin. S-ro Simpkins ricevis honorarion de la stacio sed malavare sendis ĝin al la Societo por ke oni uzu gin por E-o.

Anoj de la Brisbana Societo vespere kunvenis ĉe la hejmo de la UEA-deligito en Brisbano por saluti la vizitanton.

Sekvantan tagon S-ro Simpkins gastigis S-ron Littleton, la delegiton, kaj ties edzinon je surŝipa temanĝo. Je la kvara p.t.m. la ŝipo forlasis Brisbanon survoje al Sidnejo.

Kie kuŝas la ceteraj raportoj?—Red.

**Thank You!** Messrs. F. Wall, E. Hanks, I Slavoff, H. Fidge, 12/6. Mesd. Fest, A. Hintze, 12/6; E. M. Hill, 6/3; Miss Telfer, 12/6; Dr. Fridenbergs, Rev. Mr. Rymer, 12/6; Mr. Leerveld, 6/3.

**SPECIAL THANKS**

to Dr. C. Caldera, 25/-; Dr. F. Williams, F. Banham, 20/-; Mr. S. Ling, 30/-. M.E.K., 31/4; sales Rondo, 5/-.

Rustle up a thought for the Blind Esp-ists. Address the good word to Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, Aleksiskivenkatu 22, Helsinki, Finland.

Brit. Esp., Maj-Jun. 1954 havas 20 p. El tio 11½ estas literaturaj, lingvaj kaj recenzaj. NAŬ efektivaj recenzoj! La cetera 8½ p.—noveleto, organizaj aferoj div. novajoj ali- kaj landaj &c. (Ĝi donis 86 liniojn pri "Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj"; mi donis dek.)

Ne kuraĝigas E. aŭtorojn kaj tradukintojn ricevi nur mencion anstataŭ recenzon precipe pri grava verko. La tasko kaj risko eldoni libron en E-o estas tiel tre timigaj, ke senrezerva helpo de redaktoroj estas alte dezirinda. Ni volas vendi verkojn; aĉetontoj deziras formi juĝon pri mendotajoj. Ju pli da recenzoj, des pli la ŝanco ricevi ekvilibritan takson. "Progresigo" de E. estas grandparte ligita kun vigla verkado, kaj mongajna vendado de libroj.

Monmanko estis konstanta inkubo, kaj la historio de la gazeto pruvas, ke neniu redaktoro aŭ komitato sentis liberon el tio. Aperigo de kolonoj da nenigravaj raportetoj ne fluigus monon en la kason. Nur lojala kaj ĝenerala subteno tion farus. Peki kontraŭ sia preskompila sento, penante jes-klini la kapon al ĉiu kritiko, redaktoro trovus ĥaoson en la menso, kaj la gazeto glitus en Hadeson por saluti la ceterajn fantomojn.—RED.

## OPINI-KONTROLO.

Enketo Gallup en Aŭstralia Junio 1954:

Prikuira libro, vortaro kaj Biblio estas trovataj en preskaŭ naŭ el ĉiu deko da hejmoj:

| | |
|---|---|
| Kuiracienca libro | 90% |
| Vortaro | 88 |
| Biblio | 86 |
| Atlaso | 70 |
| Ĝardenkultura libro | 66 |
| Enciklopedio | 53 |
| Pri-strata gvidlibro | 45 |

Patro: Nu, fileto, kiel vi sukcesis en la ekzameno?

Filo: Mi estas certa, ke mi donis almenaŭ unu pravan respondon.

Patro: Kiu estis tiu?

Filo: Oni demandis min, ĉu mi povas nomi la dek du apostolojn, kaj mi respondis: Ne!

(Kiom el vi, legantoj povas respondi: Jes.)

# Recenzoj

ANTOLOGIO DE BRAZILAJ RAKONTOJ. Eldonis Brazila E-Ligo, Praca de Republica 54, 1, Rio de Janeiro. 309 p. 18/9 ĉe niaj agentoj.

Jen kolekto da rakontoj verkitaj de membroj de la Brazila Beletristika Akademio en Rio de Janeiro. La verkintoj mem elektis la enhavon de la antologio. Ne malmultaj Akademianoj favoras E-on, kelkaj eĉ estas E-istoj. Por apogo morala de la Akademio la E-istaro forte dankas.

La prezidanto verkis antaŭparolon, en kiu li majstre skizis la evoluon de la brazila prozarto. Notinda ankaŭ estas lia malfavora juĝo pri la angla lingvo rigardata kiel superrega, kvazaŭ "internacia", kaj lia elokventa tributo al E-o.

Ĉi tiu florfasko el la ĝardenoj de la prozmajstroj meritas, kaj sendube ricevos, komparon kun la svisa, ĉeĥa kaj hungara. Kun du-tri esceptoj oni facile legas la novelojn, skizojn kaj alegoriojn, ricevante ĉe la fino de la unua speco tiun surprizon tiom arde deziratan de novelamantoj. Sed Aventuro de Bukedo, Sinjoro Ĉefanĝelo kaj unu-du aliaj postulas aparte intensan fortostreĉon por ricevi je unu lego la efekton, kiun la aŭtoro certe volis transigi al legantoj.

El la proks. 40 aŭtoroj la recenzinto plej ĝuis: Paĝo Relegata: pro ĝia simpatia arte-evoluinta analizo de psikaj perturboj de junulo, amikumante kun bela edzino. Heredaĵoj: dolora studo pri filo, kiun premas la veneno de praavaj instinktoj. La Kartonkapulo estas cinika satiro pri la moderna soci-malmoralo, kiom ĝi koncernas la simplan honestecon en la ĉiutagaj aferoj. La Senutila Promeso temas pri la amo de fidela virino, kiu elpreĝas la vivon por malinda edzo, marasme mortanta. Ŝia sanktulo revokas al li la vivon—por ricevi forton por amori kun maldeculino.

Kelkloke makulas la kolekton erara uzo de la adverbaj participoj, kio igas tutajn paragrafojn dubsencaj; kaj oni saĝe reverkus, stile plibonigante frazojn, kies strukturo neniel plaĉas. Simile al "Antaŭ 2000 Jaroj" la nuna

havas kelkloke peze participiecan stilon, kio eble devenas de la originala lingvo.

Malgraŭ la supraj rimarkoj la libro indas vastan legadon, kaj tentas jam la unuan el multaj homoj al provo traduki preferatajn pecojn por propra plezuro. Recenzanto farus malutilon al la E-a afero, ignorante kaj silentante pri lingvaj demandoj, kiuj nepre devas esti tiritaj sub la okulojn de la koncernatoj.

---

**"TRIESTE — AL KIU?"** Eld. Slovenia Esperanto Ligo, Poŝtfako 275, Ljubljana, Jugoslavia. 44p. Mapo. Sendu p.k.

Tiel longe, kiel la homoj restos viktimoj de geografiaj-ekonomiaj premoj de fuŝa, malekvilibrita mondsocio, tiu aŭ tiu homgrupo plendos, ke najbaroj posedas teron, kiu devus ja esti ilia leĝe propra.

Povas esti ja ke en iuj okazoj ili prave plendas, kaj por multaj oreloj aŭ okuloj la elokventa, klare esprimita asertado de la Jugoslavoj favore impresos. Ni plezure vidas Esperanton servi en batalo paca, racia—vorta, ne perforta. Restas ankoraŭ vidi rebaton peritan de la Itala E-Ligo aŭ simila.

Enmiksiĝante en internacia disputo pri kiu li scias malmulte, la meza homo emas lasi sin favori tiun flankon al kiu li sentas lingvan, rasan aŭ religian simpation kaj parencecon. Anglo estas ordinare pli familiara kun la itala lingvo kaj religio, ol kun la slavaj, tial, se li estas raciema, li avertas sin pri tio, kaj konscie ĝin rigardas kiel emocian faktoron, kiu devas ne influi sur la rezonadon. Tio validas, kompreneble, ankaŭ por slavo, kies instinktoj same bezonas bridon, kiam temas pri disputo en kiu rase neparenca grupo estas partio.

Ni gratulas la eldonintojn pro ilia entreprenemo, kiu certigas rektan kaj samtempan aŭdon de ilia voĉo en ĉiu civilizita lando.—F.R.B.

---

## RESPONDO.

Ĉu entute pravas en La Rondo, n-ro 62, la kritiko pri "Lyrics From Loveland" de Joab Eljot? Laŭ la kritikinto miaj kelkaj sarkasmoj kontraŭ la kristanismo estas nur milda vinagro, apenaŭ ofendetaj. Kompreneble! Por inteligenta homo sufiĉas la nura vorteto; sed, tiel mense infaneca restas la ordinara kristano pro la ensuĉataj mistikoj kaj superstiĉoj, ke super lia kapo preterflugas ĉiuj malpezaj esprim-sagoj de la sagaco kaj la racio. Plie, pri la am-temo en la libreto iom miskomprenas la kritikinto. Jen, la malamo, kvankam ekscita, estas malbela, danĝera, senprofita, detrua afero. La Amo, ankaŭ ekscita, male estas bela, profitporta, plezurdona, bena afero, SE oni amu delikate, bonsence, ne ofendante, kaj ne kiel kruda adultanto, nematura ĝuknabo (playboy), hardita egoisto. Tiun veron celis konfirmi niaj strofetoj. Nu, juĝu mem! Sendu poŝtmarkon al 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W. kaj la verketon ekspedos . . . Joab Eljot.

---

## THIS NUMBER

may be in your hands soon after November 6. If it is delayed, we hope you didn't miss the film evening in the Henry George Club, 18 George Parade, on Wednesday, November 10. The Australian Postal Dept. showed a fine 1½ hour of excellent culture reels. On November 15 club members are to visit the Central Post Office. For this ring Mr. H. M. Cohen (JU 3572).

Don't forget the Melbourne Rendevuo, last Friday in each month at the Henry George Club. Regular attendance in an atmosphere of good-fellowship profits visitors in two ways—increased grasp of practical Esperanto and widened understanding of the world around them. If in other States, attend similar gatherings, or help towards forming them.

We trust you like most of this number. If you don't — use the Forum or write to us personally. The big fish of the newspaper world expect and get plenty of criticism for not walking straight enough the lines set for them by correspondents; this tiddler expects it too.

In the Jan.-Feb. number a "dead" line sneaked in: Give Books for Christmas. But the advice is valid in any month, and you would do well to turn up our agents (p. 59, March, 1954), who can get you any book you want. Mr. E. Hearne, 14 The Corso, Parkdale, is chief agent. Enclose return postage.

CITIZEN PRINTERS, CAMBERWELL

# La Rondo

*The Australian Esperanto Monthly*

**Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.**

**Jarkotizo: 12½š (aŭ 20 respondkuponoj).**

**Anoncoj: Tri linioj: 4š.**

**Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.**
**Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.**
**Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.**

**Vol. 11, N-ro 64 MELBURNO. Okt. - Dec., 1954.**


## Thoughts on the Classics in Relation to Esperanto

**Is Latin really an aid to mental discipline?**

Academicians often point to Latin as being the supreme instrument for teaching logical thinking.

In "John o'London's", May, 1945, Frank Jones, school master, challenges this old assumption. "Latin is so difficult that not ten per cent. of those beginning the language ever acquire the ability to understand, much less appreciate, twenty consecutive lines of even Virgil or Livy. Not one per cent. will ever read Latin for pleasure after school or university. And Latin literature is far from being the greatest literature in the world even for the happy few that can understand it.

"What is rarely appreciated is the very accurate knowledge of a foreign language necessary for the most elementary appreciation of great literature. I have heard of German students who thought that 'Clementine' ranked high among English lyrics. How many classical scholars could differentiate between a Latin Kipling and a Latin G. R. Sims, a Latin Hardy and a Latin Hall Caine, or correctly appraise the poetry of a Latin Ella Wheeler Wilcox? But even if some scholars can distinguish the wheat from the chaff, to what extent can the schoolboy have even the faintest glimmer of literary appreciation? To him 'Integer vitae scelerisque purus' mean just 'whole of life and pure of crime', which may be great poetry or may not.

"The most pathetic of all classical students is the working man studying Greek to read Plato or the New Testament in the original. What can he get from En arche een ho logos more than 'In the beginning was the Word'? Don't tell me logos means more than 'word'. The point is, what does it mean to him?

"Much classical research is unbelievably trivial. One of my most brilliant ex-pupils spent nearly a year trying to elucidate fragments, often a few lines in length, of the Greek comedians. Imagine a first-rate intellect some 2000 years hence devoting his attention to supplying gaps in a mutilated version of 'Down at the Old Bull and Bush'!"

An English modern language master found something Frank Jones was surely groping for. He writes: "While I am aware that teachers of modern languages are often opposed to Esperanto, I think it would be hard to find a single ONE who, after thoroughly learning the language — and thus qualifying himself to form an opinion—still remains in opposition. . . I started studying Esperanto while still bitterly prejudiced against all 'artificial languages', and found to my astonishment that, so far from being a childish code, **it is a linguist's dream.** Almost every objection made by the non-Esperantist becomes a matter for smiling when one has made the language one's own. Time and work are needed for this, as for every worthwhile achievement, but even as a hobby it yields a golden dividend of cultural delight which amply re-

wards one's efforts. The language specialist will find that though the 'reading stage' is reached in a matter of weeks—or even days—the subject is big enough for life-time study.

"As for Esperanto in the school, there can be no doubt that it is a medium far surpassing Latin for the inculcation of a sense of grammar, the lack of which is responsible for much pitifully bad work in language-learning in our English schools."

At University College, London, in 1927, Mr. G. Mar in confessed: "I spent seven years of my youth learning Latin and Greek, one or two hours in school and a couple of hours almost every day; and I managed to get a fair average of marks each year. But had I met one of the ancient goddesses I should have been unable to express a decent platitude to her in her own tongue. Such knowledge as I acquired of Latin and Greek has been of very little use to me. Whenever I have needed to refer to classical authors I have used translations. In Greece later, my ancient Greek carried me about as far as Latin would take me in France.

"Taking Esperanto as a leisure-time recreation, I found after a few months that I knew it infinitely better than I ever knew Latin: I could read a book fluently and even converse. With good will people in Iceland, Egypt, China, Japan and other lands have helped me in my researches and given to me material of great value that I otherwise should not have had."

Marin pricks the argument that Latin is useful as an introduction to the study of modern languages such as French, Spanish, Italian, Portugese, by saying that "it is a poor introduction which is more difficult to learn than the subject it introduces!"

We would rather reverse this by using Esperanto as an introduction to these and other tongues, because the relative ease, and so attraction, of spoken Esperanto breaks down the natural inhibitions against voicing a language being learned, and so prepares mind and lips for trying to articulate a more difficult national language.

In 1921 a special committee set up by the British Association for the Advancement of Science, in the face of the Classical Association and able advocates of Latin, reported: "The acquirement of Latin is relatively difficult to the average man. Its general use as an international language has been abandoned; its revival would be very difficult and would entail the coining of a very large number of words. There would be great difficulty in securing the adoption of a uniform pronunciation. The Committee is unanimous in its conclusion that the advantages of Latin as an international auxiliary language are outweighed by its disadvantages." It decided finally in favor of Esperanto.

---

## LA PREZIDANTA LETERO.

Karaj Gesamideanoj,

Por la sukcesoj de la pasinta jaro mi deziras danki ĉiujn, kiuj kontribuis al A.E.A. per servo, saĝo, spesoj, aŭ simpatio.

Unue mi devas esprimi dankon al nia energia sekretario, S-ro Herbert Koppel, kaj la diligenta redaktoro de nia gazeto, S-ro Reg Banham, kiuj tiel multon bonege faris. Ankaŭ mi devas mencii S-ron Eddie Hearne, kiu nun gvidas nian libroservon anstataŭ la fidela F-ino Winnie Addis, sed mi tute ne forgesas la pli grandan anaron de silentaj fidinduloj, kiuj regule plenumas la necesegajn deĵorojn de nia organizo, kaj kies grandanimaj koroj ne domaĝos la mencion, kiun mi faras pri la kelkaj.

Aparte ni laŭdu la samideanojn en Canberra por sukcesplena konference okazinta pasintan Paskon. Tie iniciatiĝis planoj kaj preparoj por la Deka Aŭstralia Kongreso, la unua en nia federacia ĉefurbo, kien la "pacaj batalantoj" grandamase kolektiĝu por denove interamikiĝi kaj donu pluan instigon al la movado en Aŭstralio.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

---

## AŬSTRALIO.

Ni deziras, ke alilandaj amikoj ne uzu "Aŭstralujo", ankaŭ ne nomu nin "aŭstraloj". Lanti tiel misuzis la nomon; ankaŭ "Laborista E-isto", kiu malzorge ankaŭ uzis "Aŭstralio"—post "Aŭstralujo" en kaplinio! M. Leereveld en "Sennacieca Revuo" uzis "aŭstraloj" nomante niajn indiĝenojn, sed "aŭstralianoj" menciante la blankulajn loĝantojn.

# Australia Kroniko

● **ADELAIDE:** Pro manko de raportoj el Adelaide, oni eble supozas, ke la ĉi tiea grupo funkcias kiel "sekret-societo", sed ne estas tiel. Nia grupo, kvankam malgranda, tamen daŭras vigla.

Sub gvidado de F-no Win Addis, kunvenoj okazas ĉiumerkrede ĉe Football House, Hindmarsh Square, sur la unua etaĝo en la tre komforta kunven-ĉambro de la Y.W.C.A. (S-ro "Sibarito" Winchcombe povas atesti pri la komforteco.)

La grupo nun funkcias kiel klubo sub la aŭspicio de la universitato (W.E.A.). Kelkaj gelernantoj ĉeestas, kiujn instruas F-no Telfer. La geprogresintoj sin okupas pri diskutado kaj solvo de tradukproblemoj.

Aŭgusto 27 mondvojaĝanta samideano S-ro Simpkins atingis Adelaideon, kaj estis bonvenigita per babilvespero ĉe la hejmo de F-no Kempson, kie li regalis nin per interesa rakontado pri sia tramonda vagado. Multe ni envias lin.—H.W.F.

● **SYDNEY:** Aprilo 5 nia reklamo por la nova kurso kulminis per varbvespero en la Klubejo. S-ro Rutland bonhumore parolis pri siaj lingvaj spertoj en aliaj landoj, kaj pri la utiloj de Esperanto. Vizitanto S-ino Canty (Novzelanda, survoje al Haarlemo) aldonis pluan internacian spicon. Ŝi bonvole montris belajn lumbildojn pri Novzelando. S-ro Turvey kaj aliaj klubanoj aldonis kelkajn vortojn, subtenante Esperanton. Aprilo 12 la kurso komenciĝis, kun 21 lernantoj. S-ro Schwerin gvidas ĝin laŭ 'Ĉe'-metodo.

Alia vizitanto el Novzelando estis S-ro Capell, kiu intencis viziti Haarlemon. Dum amuz-vespero li montris siajn bildojn pri la novzelanda kamparo. La Eŭropaj samideanoj certe interesiĝos pri tiu insuloj, post konatiĝo kun la du Insulanoj.

Ni tre ĝuis la Kanberan Kongreseton, kaj deziras grandan sukceson al la grupo tie.

En tiu ĉi periodo, vizitis la klubon du malnovaj anoj—S-ro Worrall, kaj S-ro Howlin. S-ro Howlin ne parolis Esperanton dum proksimume tridek jaroj, sed li jam bone re-Esperantiĝas.

Aro de desegnaĵoj venis de Svedujo, kaj kaŭzis grandan intereson. Ili estas interŝanĝaĵo kontraŭ infan-artaĵoj senditaj el lernejo en Cabramatta. Tiaj aferoj povas multe helpi la infanojn kaj konatiĝi kun aliaj landoj kaj konstati la bezonon por Esperanto.

Mondvojaĝanto S-ro W. L. Simpkins (origine el Anglujo) vizitis Sidnejon en Julio-Aŭgusto. Li vigligis niajn kunvenojn dum kelkaj semajnoj per rakontoj pri enviinda irado tra multaj landoj. Li renkontis Esperantistojn en Svedujo, Hispanujo, Sud-Afriko, Kenja, Hindujo, Hong-Kong, kaj Japanujo. Ĉie li trovis helpemecon kaj amikecon.

En Aŭgusto ni ĝuis Distran Vesperon, planitan por kunligi nin kun la feliĉuloj en Haarlemo. La Nederlanda Konsulejo volonte donis kelkajn belajn afiŝojn, kaj pruntis vidindajn sonfilmojn—unu pri la ĝenerala vivo, unu pri komerco, kaj unu pri la popoldancoj.

S-ro Simpkins faris anglaligvan paroladon por la gastoj, pri siaj spertoj, kaj impresis ĉiujn tre favore.

Dum te-trinko okazis aliaj neformalaj paroletoj varb-celaj. Ankaŭ, estis bona okazo por la kursanoj intermiksi kun la malnovaj klubanoj, kaj lerni iom pri la Esperantista vivo.

En Septembro, S-ro Jim Davidson kaj S-ro Bill Dowson vizitis nin, kaj raportis pri komenco de grupo en la Instruista Kolegio en Bathurst, kie ili studas. Ni esperas baldaŭ aŭdi pli pri tiu bonega provo.

Bona artikolo de S-ro Dowson pri Esperanto aperis en "The Leader", loka gazeto en antaŭ-urbo Liverpool. —E.D.

● **ALBANY, W.A.:** En la sudokcidenta angulo de Aŭstralio fondiĝis nova Esperanto-Klubo. Ni supozas ke f-ino O. Strempel, kiu nun instruas en ĉi-tiu urbo, estis la instiganto kaj "patrino" de tiu-ĉi nova klubo, kvankam s-ro John Ferrell, la sekretario, ne menciis tion kiam li kontaktis nin per mallonga letero. Laŭ lia raporto la klubo havas nun proks. 10 anojn. Gratulon al la nova klubo kaj ni atendas pli da novaĵoj baldaŭ.

● **CANBERRA:** Dum la vintraj monatoj la klubo ne kunvenis, pro manko da membroj, sed je la fino de Septembro denove okazis kunveno ĉe "Riverside". La sekretario, s-ro Noel Gamble, paroladis pri siaj spertoj post enmeto de anonco en "Esperanto".

Raporto pri la kunveno ankaŭ aperis en "Canberra Times" (21/9). Por ebligi al niaj membroj el Queanbeyan la regulan partoprenon ĉe niaj kunvenoj ni aranĝis ke kunvenoj nun okazas ĉiun lastan vendredon en la monato ĉe "Good Neighbour's Council", ĉe Riverside.—Harry Torr.

● **BATHURST,** N.S.W.: Nia fervora membro s-ano James Davidson, kiu estas enmigrinto el Aberdeen (Skotlando) nun studas ĉe la Instruista Kolegio en Bathurst kaj fondis tie E-kurson kaj klubon. En la kolegia gazeto "New Panorama" li jam publikigis 2 artikolojn pri Esperanto. 12 studentoj partoprenas en la klaso. Je la 14-a de Sept. okazis elektoj, jen la rezulto: Prez: S-ro James Davidson, Vicprez: S-ro Peter Elliot; Sekr.-Kasisto: S-ro William Dowson; Vicsekr.: F-ino Cynthia Colless; Bibliotekisto: S-ro Peter Roach. Gratulon al la nova klubo. Ni esperas ke la instruistoj-esperantistoj dissemos nian ideon post kiam ili forlasos la kolegion kaj dejoros kiel instruistoj en diversaj urboj de Nov-Suda Kimrujo.

● **MELBOURNE:** Ĉiam varia estas la ĉiumerkreda programo le la Melburna E-Klubo kaj dum la lasta tempo vizito de eksterlandaj kaj interŝtataj s-anoj krome plibonigis la programon. "Tra Francujo per biciklo" (4/8) kaj "Holando sub germana okupado (18/8) de s-ano Leereveld estis ege interesaj prelegoj. La "Amerika Teo" ("alportu donacon kaj aĉetu donacon") estis financa sukceso. Proksimume £15 estis la profito de kiu unu duono iras al la kaso de la Rondo kaj la resto al la klubkaso de la Melburna Klubo. Ni esperas ke aliaj kluboj en Aŭstralio agos same por helpi al nia asocia organo.

Malofta parolanto ĉe niaj kunvenoj estas D-ro Fred Williams, sed Sept. 1 li parolis al ni "Pri Okuloj". Kvankam la temo estis faka, li vekis grandan intereson kaj devis respondi al multaj demandoj. Samvespere ni havis la plezuron bonvenigi la simpatian sekretarion de la Canberra E-Klubo kaj venontan kongres-sekretarion por la 10-a tutaŭstralia E-Kongreso. S-ro H. Koppel (8/9) informis nin pri la nuna stato de la E-movado en sia parolado "Tra la Mondo E-ista" kaj (6/10) priskribis antaŭ-militan ŝipekskurson sur la Danubo de Vieno ĝis la Nigra Maro. Li ilustris la prelegon per helpo de landkartoj. Neordinara temo estis "La Formo de Poezio" (22/9), sed nia A.E.A. prezidanto, s-ano Ken Linton, bone komprenas interesi siajn aŭskultantojn kaj donis belajn ekzemplojn el la poezio angla kaj E-a. S-ino E. Hill (29/9) resume prikomentis la libron "Invito al Cielo" de la usona E-isto Sayers.

Okt. 13 alvenis en Melburno angla mondvojaĝanto s-ano W. L. Simpkins kaj samvespere prelegis pri Japanujo kaj la tiea movado. Aliajn prelegojn li donis pri Hindujo (27/10) kaj pri Suda Afriko (18/11) S-ano R. F. Latimer, kiu dejoras sur la granda aviadilŝipo H.M.A.S. Sydney, alvenis Melburnon (3/11) kaj dum tuta horo rakontis pri siaj vojaĝoj tra la mondo kaj vizitoj ĉe E-kluboj en 5 kontinentoj. Kelkajn tagojn poste (6/11) la anoj vizitis la grandan aviadilŝipon sub gvido de nia sperta samideano.

Eksterordinare belajn filmojn prezentis la Poŝta Direkcio (10/11). Tiuj-ĉi filmoj estas haveblaj ankaŭ al aliaj E-kluboj se ili kontaktos la P.M.G. Departmenton en la respektiva ŝtata ĉefurbo. Kiel sekvo al la filmvespere, klubanoj vizitis (15/11) la centran poŝtoficejon kaj observis la modernajn metodojn por klasifiki kaj ekspedi milojn da poŝtaĵoj al la vasta mondo.

En la ĉiumonataj kunvenoj de la RENDEVUO, s-ro Burstein parolis en la aŭgusta kunveno pri la juda popolo kaj ĝia historio tra la jarcentoj. En Septembro s-ro E. Hanks montris belajn lumbildojn pri arboj kaj birdoj de Aŭstralio, faritajn antaŭ pli ol 40 jaroj de la majstra fotografisto s-ro Matingly, kaj dum la oktobra kunveno s-ino Byatt parolis pri sia vojaĝo tra Europo. Kvankam ŝi ne kontaktis kun E-istoj, ŝi pentris belajn bildojn pri diversaj spertoj, speciale en Italujo kaj Svislando. Je tiu-ĉi kunveno ni havis la plezuron bonvenigi la prezidanton de la Brisbana E-Societo, s-ron S. L. Parry. Sub la gvido de s-ano Parry, la Brisbana E-Societo aktiviĝis lastatempe kaj ni esperas ke nia movado kresku baldaŭ en Kvinslando.—H.K.

● **PERTH:** Ĉe nia julia kunveno ni adiaŭis s-inon Ruth McGrath. Sia edzo akiris novan oficon kiel kontestro de la Bunbury Publika Hospitalo. Ni

transdonis donacon al Ruth kaj ni esperas ke ŝi baldaŭ fondos novan Esperant-klubon en Bunbury. Unuagrada kurso, sub s-ano A. Saar, finiĝis en julio kaj 8 studantoj ricevis atestilojn. Plej sukcesa studanto estis S-ino Gunderson, "Fullbright Scholar" el Usono. Sammonate finiĝis ankaŭ kurso de D-rino V. Summers ĉe "Adult Education Board". Dum la dua semajno en Julio la Ligo partoprenis en la jara Ekspozicio de la "International Goodwill League". Je 3-a Nov. okazis duagrada ekzameno por 4 studantoj.

En Sept-o nia kasisto, F-no Longson, veturis al Japanujo por libertempo, revenonte en la nova jaro.

Nia societa vespero en Sept-o estis plezura afero, kaj ĉe la monata kunveno S-ro Walker daŭrigis la historion de sia per-bicikla vojaĝo en Eŭropo.

Ni ĝojas havi F-non Strempel denove inter ni, post ŝia resto en Albany. Ŝi nun gvidas novan klason en Perth.

Sept-o ankaŭ vidis belan okazon en la 'Flortago', en kiu ni montris nian emblemon.

Al Kalgoorlie ni sendis materialon por helpi ekspozicion por la Australian Inland Mission. La ĵurnalo de Kalgoorlie donis tre bonan publicon al nia parto.

Pri la Premio Masel ni ricevis kvar prozajn verkojn, sed ili ne atingis la meritnivelon de tiuj de antaŭaj jaroj, tial ni ne aljuĝas la premion en 1954.

En Nov-o ni bonvenigis E-an mariston, S-ro Robert Nicolson, dum lia ŝipo restis en la haveno Fremantle; ankaŭ S-ron Sidney Grant, de Port Lincoln, S.A., kiu ĉeestis la kongreson en Jan-o. Li libertempis ĉi tie, sed restis en Perth nur du tagojn.

To State reporters: Please send your reports direct to Mr. Koppel, not to the Editor.

## REDAKTOROJ!

**Sendu gazetojn, librojn kaj ceterajn REKTE al F. R. Banham, 2 Banchory Street, Essendon, W5, Victoria, Aŭstralio, por ke li povu senprokraste pritrakti aferojn.**

UNESCO—Ni intencas doni objektivan raporton pri la afero Esperanta, tuj kiam definitiva novaĵo nin atingos.

## MORTOJ.

Kun sincera kondolenco ni informas pri la morto en la 28a de Oktobro de nia fidela samideanino Hettie Sara Davies (naskita Bostock). Preskaŭ tri jardekojn ŝi havis konstantan rilaton kun la Melburna E-Klubo kaj multe da jaroj regule plenumis la taskojn de la Traduka Kurso. La gvidantoj de ambaŭ rondoj amare sentas ŝian ne-plu-eston, sed kore tenados ŝin en la memoro.

Kun ŝia brava edzo kaj kun ĉiuj, kiuj ŝin amis, ni etendas la manon de pura simpatio kaj kunsento.

WANDA ZAMENHOF, edzino de D-ro Adam Zamenhof, filo de nia Majstro, pro aŭtomobila akcidento en Pollando.

PAUL BENNEMAN, en Leipzig, 69-jara.

HIMNARO ESPERANTA: 4th edition, compiled by M. C. Butler. It has 236 hymns, of which 34 are accompanied by the tunes. For the rest there are given references to the last edition of 12 well-known hymnals. Wholly unsectarian, the book can be used by all Christian churches. 174 p., 4/6 at agents.

## ALFRED TUCKER

of the Society of Friends, attended the world pacifist congress in Japan, April, 1954, representing the War Resisters' International. He says ("The War Resister", Nr. 65): "English and Japanese were the official languages and the few contributions in Cambodian, Cingalese and Esperanto were translated into them. No visitor whose language was English knew enough Japanese to be helpful . . . . at most places I met Esperanto friends and in Tokio I spent much time with various groups. In every case it was far easier to carry on our converse in Esperanto than in English. Do we Europeans in general, and Anglo-Saxons in particular, act quite fairly in asking others to meet us on our own linguistic ground?"

He adds that the Japanese Anarchist Federation, active in Japan, uses Esperanto for international purposes, and he freely conversed with secretary Yamaga in this language.

### LIBERA FORUMO.

La Esperanto-organizajo en Aŭstralio estas malgranda kaj malriĉa; nia reklamo estas tre sensistema kaj malforta. Tamen ni elspezas grandan sumon—ĉiom de nia mono—je eta, imponcela, sed neefika gazeto, "La Rondo".

Landa gazeto estas tre necesa, sed "La Rondo" ŝajnas nur emfazi la bezonon. Ĝi celas esti samtempe kaj impona aĵo por montri nian fortecon al aliaj landoj, kaj informilo kaj ligilo inter la aŭstraliaj grupoj. Nek unu nek alia ĝi povas esti en la nunaj cirkonstancoj.

Tio estas la kritiko; jen la sugesto: Ke la nuna, profesie presita, malofta "Rondo" fariĝu monata, regula, ŝablonita gazeto. Certe estas E-istoj, kiuj povas kontrakti la ŝablonadon.

En ĝi aperu la klubaj informoj, bagatelaĵoj, represaĵoj el aliaj gazetoj, kiel ankaŭ kontribuaĵoj de la anoj. Cetere, la Kongresparoladoj kaj la verkoj de la Masel-konkurso estus ege interesaj, kaj estas jam-preta materialo por almenaŭ parto de la jaro.

Unu fojon ĉiujare la A.E.A. eldonu laŭeble imponan revuon, kiu povus esti vendata en ĉiuj landoj. La enhavo povus esti la plej bonaj artikoloj k.t.p. en la monataj folioj, kaj informaj artikoloj pri Aŭstralio. Tiamaniere ni havus pli aktualan, interesan kaj malmultekostan ligilon kaj pli indan transmaran reklamilon.

La samideanoj pli volonte abonus gazeton, se tio publikiĝos pli ofte kaj pli akurate, kun pli aktuala enhavo, eĉ se ĝi aspektos iom pli malriĉa. Tiel ankaŭ, la raportantoj, la kontribuantoj, pli volonte laboros, se estos regula gazeto kun difinita limdato.

La mongajnon ni uzu por enmeti reklamojn en ĵurnalojn, por presigi flugfoliojn k.t.p. kaj (optimisme) por aĉeti bonan libro-provizon, por ke libroj ĉiuspecaj estu tuj haveblaj, kiam la kampanjo sukcesos.

—Sydney Esperanto Society (J Matasin; E. Dash; E. Klussendorf).

---

Salutoj al ĉiuj aŭstraliaj samideanoj de via samlandano, nun en Francujo, por la kristnaskfesta kaj novjara sezonoj.

—Kevin L. G. Smith, ĉe College Classique, Romans, Francujo.

# Tra La Mondo

BRITAIN: U.E.A. is selling its House in Heronsgate so that it may have a centre in London.

There are 920 Braille volumes in Esperanto at the British Museum library.

BELGIUM: D-ro Zamenhof Strato in Antwerp, 30 July.

KENYA: Karl Ryba of Vienna suggested to a friend who had not heard from his sister in Kenya (E. Africa) that he use the services of U.E.A. In three weeks R. Rayner, E-o delegate in Nairobi, enabled contact with the missing one. The relatives in Vienna had tried the Red Cross—in vain.

FRANCE: In Nancy 500 from 15 countries attended the congress of S.A.T. Registered, 553 from 21 lands.

THE SUDAN: The Premier learned E-o 24 years ago and still favors it. Mr. Nigmo, who attended the Haarlem Congress, had an interview with him on the matter. Several are trying to organise our affair in the country and help in the form of English keys and textbooks would be appreciated by Eldirdiri Ibrahim, University College, Khartoum. Nigmo hopes for some 200 new E-ists after two months.

JUGOSLAVIA: A book in Esperanto on the life and work of J. Slav Esperantists who fell in battle or war action is to be published.

A 518 page biography of Tito has been published in Esperanto. M. Stuttard translated it from the English version in 32 days. Surely a record for translation into Esperanto. Tito is familiar with Esperanto, and favorable to it. He learned it while in jail.

JAPAN: 41st Esperanto national congress brought together 300 Esperantists in Tokio. Authors, Unesco-commissioners and others took part.

HOLLAND: "Het Parool" newspaper printed two articles, one by Mason Stuttard in favor of Esperanto, and one by Dr. Dudok for English as an international language. A poll, based on the articles, gave 94.9 of readers' votes for Esperanto; 5.1 against.

AUSTRIA: Ministerial Councillor Dr. Rudolf Fischer, an ardent Esperartist, has been made a vice-Minister. Dr. Frenzel is also a member of the Austrian Government.

CZECHOSLOVAKIA: At important Praha concert Prof. Urban reaped success with three melodies based on Esperanto poems by Kalocsay, famed Hungarian Esperantist. In a prologue to the singing of them, the significance and euphony of Esperanto were stressed to the audience.

Czech literature translated into national tongues through medium of Esperanto is slowly influencing the authorities in C.S. towards favoring Esperanto. Chinese and Japanese texts were especially impressive.

GERMANY: Of the 70 interpreters at the Fulda Catholic congress, seven fluently spoke Esperanto.

In Garmisch 200 pupils and 100 teachers saw the Esperanto film "Aŭstralio Hodiaŭ."

SPAIN: Some 400 attended the national Esperanto Congress in Zaragoza. Marg. Boulton (Eng.) won the first prize for original poem.

## TIKLA TEMETO.

Tradukante paragrafon sur p. 75, malŝatanto de neologismoj penadis Esperantigi "brassiere" per pure propra radiko "indiĝena". Li ankaŭ ne atingis sukceson. Pri tiu objekto, ofta menciaĵo en la moderna modliteraturo, la Plena Vortaro morte mutas. Nia redaktoro, frontate de la problemo, petus forpermeson por longa reserĉo; nia redaktorino—ĉe kiu ni certe ricevus solvon—bedaŭrinde suferas de neekzisto.

"Brasiero" rancas de neologismeco, implice anoncante per sia uzateco ian mizeron de esprima kapablo ĉe nia cetere mirinda lingvo. Nur malesperantoj uzus ĝin.

Iu lingve-lertulo brile proponis serion da alternativaj formoj, el plej pura Esperanta fonto, sed ili pensigas min ne pri buduaro. Ili elvokas viziojn de anatomiejo, patologia kliniko aŭ laktbovinejo.

Mi fermis la okulojn, ĝentile petante, ke li provu ankoraŭ fojon, serĉe al vorto, kiu same saltigus la sentojn de belulinoj, kiel jam de longe faris la pesta por mi "brassiere".

Sendu viajn tradukaĵerojn, premiote de mia dolĉa rideto.—F.R.B.

## PRI BRASSIERE.

Serĉante tradukvorton por "brassiere", nia red. tuŝis unu el la plej absurdaj sed samtempe gravaj mankoj de nia lingvo. Supozeble E-o estas lingvo por nudistoj! Nur la virojn oni traktis sufiĉe afable; kompatu nin virinojn, kiam frostas vintre! Robon ni povas porti, aŭ jupon kun bluzo, sed kio malhelpas, ke malica vento subblovu la robon, jupon aŭ subjupon de la kompatindulino kaj tremigu ŝian tutan korpon de malvarmo?!

Ĉiu scias, ke ni E-istoj estas decaj homoj, do la Plena Vortaro nepre trovos por ni ion por kovri nian postaĵeton. Sed kion? Post esploro, ŝajnas al ni, ke ni devas gardi nian ĉastecon per vira vesto, pantaloneto, kiu kovras la korpon de zono ĝis genuoj. Ĝis genuoj! Certe neniu Kasanova volus penetri la buduaron de E-istino!

Eĉ ne trovas lokon en la P.V. la elpensaĵo de la siatempe aŭdaca S-ino Bloomer; kaj pri ĝia jam multnombra idaro ankaŭ eĉ ne vorto. La vortaro permesas al ni porti ŝtrumpojn sed denove silentas pri la problemo kiel defendi ilin kontraŭ la gravito. La krurzonon ni jam de longe rezignis al la membroj de la fama ordeno.

Ĉu pro malico aŭ pro pudoro la P.V. mutas pri kurbokaresaj virinaj subvestoj? Sed ni revenu al la problemo de la mammuldilo. Mi estus kontenta akcepti la vorton "brasiero", sed kiel oni plu tradukus "uplift brassiere", "strapless bra", "inflatable bra", "sweater girl" kaj la kapricaĵojn de S-ro Dior kaj liaj similuloj?

La bezonojn de virinoj oni kruele neglektas. Kara red., dediĉu vin ĉampione al ilia afero tage-nokte senĉese. La nepoj vin benos!

E-o estis kreita de viro kaj inter la nunaj Akademianoj ne estas eĉ unu virino. . . . La virinoj ĉiuj jam plene okupiĝas, nutrante la nunajn Akademianojn kaj lavante la ankoraŭ sennoman kvadratan tolveston de ebլaj estontaj Akademianoj.

—Evo.

"La unuaj Lingva-Akademianoj en 1905 ne ĉiuj posedis la nivelon de Kabe kaj Grabowski; eĉ estis inter ili homoj, kiuj apenaŭ scipovis legi Esperanton."—W. F. Kruit, en Laborista Esperantisto.

# Recenzoj

LA NORMANDAJ RAKONTOJ de Guy de Maupassant. Trad. Roland Dupuis. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 19. 211 p. 30/9 aŭstralia, ink. afranko. Ĉe niaj agentoj.

Luksa libro, 18 rakontoj de la franca novelmajstro, kies artesprima genio jam tra kvin jardekoj disfluis en imitintojn kaj inspiritojn ĉe la sama verkmedio. Lia plumkreaĵo ne estas en si samegala. Parton de ĝi iuj nomus klasika, altnivela, eĉ tel edifa, moralinstrua; alia parto ricevis la rozkarnan kovrilon de kruda volupto, kaj la aĉetemon de literatura kanajlaro. De Maupassant verkis pli ol 200 novelojn. La Normandaj Rakontoj ne traktas pri la amoraĵoj, tiel tre oftaj en la skriboj de nia aŭtoro, sed ĝenerale reliefigas la avarecon de la tiuprovincaj kampuloj, kaj ĝian potencon ilin krueligi. Ke iliaj benoj karesas la kapon de la famulo, pri tio ni rajtas dubi.

Tamen pli sanaj trajtoj ankaŭ havas lokon. Boitelle, kies gepatroj igis neeble, ke li edzinigu negrinon, ĉar ŝi estas "tro nigra", rezignis pri la virinoj kaj restis celibata fekaĵisto.

Spirite vundita homo, false akuzita pri ŝtelo, ĉagrene mortas pro ŝnurpeco, kiun li hazarde prenetis de la vojo, kaj kiun alia malice nomis sia monbiletujo.

La sovaĝa patrujamo de Sankta Antonio kaj de Patro Milon (kampuloj), kiuj mortatakis invadintajn germanojn. La unua eskapis per erara ekzekuto de senkulpulo; la dua ricevis fusilsalvon responde al sia lasta ago—kraĉi en prusan vizaĝon.

La traduko estas el plej bona speco. Kelkaj esprimoj laŭvorte tradukitaj el la franca tamen indas atenton de s-ro D.

Iuj sentas naŭzaj la ofte fortaromajn temojn de De M., sed malmultaj neas lian akre faktecan observon sur la vivon, nek lian nekompareblan kapablon korpigi en kristala prozo la vivbildojn de li viditajn. Ne subtila, li ne sekvis rigidan teorion de la arto, nek havis moralan aŭ socian antaŭjuĝojn. Lia simpla testamento pri sia literatura elrigardo kuŝas en la eseo, kiu heroldas "Pierre et Jean". Eble ĝuste pro lia relativa libero el la teorioj oni nomas lin artisto la plej perfekta. La subtitolo de "Une Vie" —"La Humila Vero"—rajte indikstampus ankaŭ lian ceteran verkon, kun eble malmultaj esceptoj.

Por "L'Esperantiste Francais (Jan. 1936) Prof-o Waringhien kompilis la literaturaĵojn francajn en Esperanta vesto. Kiel ĝoje li tiam estus aldoninta ankaŭ ĉi-tradukon, kiu jam plibriligas en alta grado tiun diademon de granda popolo.—F. R. Banham.

### FERVOJISTOJ

La Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj fondiĝis la 4an de Aug., 1948, en Amsterdam. Sekretario: Jon Lok.

En 1949 li vokis la Australiajn fervojistojn; en Jan. 1951 ni fondis la Australian Asocion Fervojistan Esperantan, kun 4 membroj. Malrapide niaj anaro kreskis ĝis deksep: 5 en Newcastle (N.S.K.); 1 en Sud-Aŭstralio; 11 en Viktorio.

Ĉiu ŝtato en Aŭstralio havu reprezentanton! Kotizkosto absurde malalta—3 ŝ. jare. Vi ankaŭ ricevas la dumonatan gazeton de la I.F.E.F.

Legantoj de La Rondo, helpu nin! S-ro E. Crowe (sek. A.A.F.E.), 102 Shaftesbury Street, Coburg, Vic.

---

La ĉeha "Pacdefendanto" (Sept.) represis la recenzon "Ni ne povas silenti" ĉe p. 63 "La Rondo".

### DR. OTTO JESPERSEN.

"I should never have been able to do the little I have done in the field of general linguistics, and even in that of English syntax, had it not been for my profound study of the international language projects." (2nd International Congress of Linguists, Paris, 1933.)

### LIMERIKO.

En kluba bulteno de Canberra E-Klubo (Aŭstralio) oni povas legi la jenan:

Belega fraŭlino el Nigro
Eliris por rajdo sur tigro;
La rajdo finiĝis,
Ĉar ŝi interniĝis,
Kaj grase ridetis la tigro.
("H. de E.")

---

Paul Robeson estas la plej granda muzikinstrumento kiam ajn farita de la naturo.—Alex. Woolcott.

CITIZEN PRINTERS, CAMBERWELL